

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

esperanto

v-19034/1997

POPOLA


ĜINIO

中國新道

2

1997

ISSN 0032 - 4361



**DE KIU DEPENDAS ĈINAJ
MALJUNULOJ?
BUDHISMO RADIKAS EN TIBETO
KIE APERIS LA UNUA BIRDO?**



Ponto super strato

Foto de Xue Jianguo

INTER NI

Dum la lastaj semajnoj mi plurfoje legis en italaj gazetoj pri decido de via lando ne plu uzi la anglan lingvon en gazetaraĵaj konferencoj nek en internaciaj kongresoj. En niaj informiloj oni ne bone kaj objekte klarigas la kialon kaj la historian fonon de tiu decido. Sed mi kredas, ke la kriterioj por la elekto de lingvoj por internacia komunikado estas tre grava kultura problemo. Tiu problemo estas eĉ pli interesa por ni Esperanto-parolantoj. Ĉu vi aperigus artikolon pri tiu decido?

MAŬRO LA TORRE
(Italio)

Lastatempe nia tagĵurnalo MAINITI (unu el la tri potencaj ĵurnaloj en Japanio) raportis novan politikon de la ĉina registaro, ke ĝi ne uzos la anglan lingvon, sed nur la ĉinan, kiam ĝi publikigos la oficialan informon al eksterlandaj ĵurnalistoj. Ĉinio nun plenumas grandan rolon en internaciaj politika kaj ekonomia medioj. Do ŝoka estos la decido de la ĉina registaro kaj embarasos ilin, ĝis fine ili atingus la ideon

de neceseco de internacia lingvo neŭtrale homa. Mi volas scii, kian planon havos eksterlandaj ĵurnalistoj kontraŭ la nova politiko de la ĉina registaro. La afero tre interesas esperantistojn.


MATUMOTO KEN'ITI
(Japanio)

Supozeble niaj multjaraj legantoj Maŭro La Torre kaj Matumoto Ken'iti jam legis koncerne raporton en la 1-a numero de nia revuo, 1997. Ni samopinias, ke tio estas grava decido de Ĉinio ne plu pretigi anglan interpreton por gazetara konferenco de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio. Ni ankaŭ kredas, ke kiam aperos similaj decidoj en aliaj landoj, certe en pli ampleksa sfero de la mondo kreiĝos "la ideo de neceseco de internacia lingvo neŭtrale homa", kiun deziras ne nur samideano Matumoto, sed ankaŭ aliaj esperantistoj.

La Red.

El Popola Ĉinio

2 [461] 1997



En maljunulejo

Foto de **Da Wei**

La seninfana Zhao aĝas 88 jarojn. Antaŭ 37 jaroj li ekvivis en la Pekina Unua Maljunulejo, starigita de la pekina magistrato. La maljunulejo servas ankaŭ per kuracado. Kiel aliaj maljunuloj, Zhao vivas senzorgan kaj komfortan vivon en ĝi.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata

de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Hou Zhiping

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+ 86-10-6832 1808

ENHAYO

2 *INTERNI*

4 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*

De kiu dependas ĉinaj maljunuloj?

6 Vivo de ĉinaj emeritoj

8 *ĈINAJ E-ISTOJ:*

Wei Yuanshu sin dediĉanta al E-instruado

12 *ORIGINALE VERKITAJ:*

Poemoj el Vjetnamio

13 *ESP-NOVAĴOJ*

14 Postskribo de la sepa volumo de "Kolekto de Tradukoj de Bakin"

16 *SUR NIA LIBROBRETO:*

Du poemoj en Esperanto kaj nacia lingvo

17 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*

Budhismo radikas en Tibeto

22 Chen Baolong kaj liaj kalabasaj skulptaĵoj

24 *POR KOMENCANTOJ:*

Kuraĝa ŝafo (Rusa fabelo); La maljuna Polkano

25 *HOMARO KAJ NATURO:*

Changbai-montaro

28 Ĉinaj superhomoj

29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*

Ĉe Qilian-montaro

36 Kie aperis la unua birdo?

38 Vilaĝa instruisto Wang Haoren

39 Guangdong: renkonte al tiu tago

41 Belega vojaĝo en Ĉinio

42 *EKONOMIE:*

Ŝanĝiĝo de Yunxi-gubernio; Changchun-a ekonomia ekspluata distrikto; Kurantaj aferoj

44 Alilanda florkulturisto en Ŝanhajo

45 Akupunkturo kaj kupra homo

46 *EL ĈINAJ GAZETOJ*

48 *MULTNACIA ĈINIO:*

Oroĉen-oj adiaŭis ĉas-pafilojn

51 *ĈINAJ POŝTMARKOJ:*


Ĉe la Akvorando

2 Ponto super strato

SUR LA DORSKOVRILO:

[*FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ*]

Paraŝutado; Vintra pejzaĝo



LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Yunxi-gubernio (p. 42)

2. Changchun (p. 42)

3. Guangdong-provinco (p. 39)

4. Heilongjiang-provinco (p. 48)

5. Yongdeng-gubernio (p. 38)

De kiu dependas ĉinaj maljunuloj?

de LAO LING

EN Ĉinio cirkulis popoldiro: “Oni naskas filojn por sia maljuneco.” Nun tio ankoraŭ ludas gravan rolon en la homa vivo. Por kio oni flegas la infanojn kun granda malfacilo? Nemalmultaj maljunuloj faris tion por sia maljuneco. Ili plejparte vivas kune kun siaj gefiloj. Se la gemaljunuloj havas tri filojn, ili do vivas kun unu el ili. En Ĉinio estas la fenomeno: kiam la tri filoj ĉiuj havas sian propran familion, la gepatroj vivas ĉe ili alterne. Unuvorte, la gepatroj pasigas sian maljunecan ĉe siaj gefiloj, tio estas tute natura afero.

Nun la urbaj maljunuloj plejparte estas pensuloj, kaj ankaŭ en iuj bonhavaj vilaĝoj ekpraktikiĝis emeritiĝa sistemo. Sekve, la gemaljunuloj ne plu estas ŝarĝo por siaj gefiloj en la ekonomio. Male, iuj el ili preferas memstare vivi ŝpare por helpi siajn infanojn. Precipe, kiam ili havas genepojn, ili malavare elspezas por ili. Iuj maljunuloj ne loĝas kune kun siaj gefiloj, tamen ili volonte flegas siajn genepojn por teni intimecon kun siaj gefiloj kaj ĝui la familian feliĉon. Iuj el ili eĉ pensas, ke se la gefiloj ne zorgos pri ili, tion faros la genepoj.

Malgraŭ ĉio ĉi, granda parto de la ĉinaj maljunuloj rigardas la familion kaj gefilojn kiel apogantojn en sia maljuneco. Tio rezultis unuflanke de la tradicia koncepto kaj aliflanke de la realaj cirkonstancoj de Ĉinio.

Iuj tradiciaj konceptoj, kiel respekti kaj ami la maljunulojn, plejparte formiĝis pro ties ekonomia dependeco de la gefiloj. Antaŭe, kiam la maljunuloj perdis laborkapablon, ili do ne povis plu vivteni sin, tial krom la gefiloj, neniu zorgis pri iliaj manĝaĵoj, vestaĵoj, kuracado kaj funebra afero. Sekve en Ĉinio cirkulis popoldiro “Pli da filoj, pli da feliĉo”. Nun la ekonomiaj kondiĉoj multe pliboniĝis: multaj ĝuas pension kaj senpagan kuracadon, tamen la tuta socio ankoraŭ rigardas la filan respekton kiel tradician virton. Krome, en la reala vivo multaj aktualaj problemoj povas solviĝi ne sole per mono.

Tri jarojn antaŭe mia patro enhospitaliĝis pro apopleksio. Kvankam la oficejo pagis por lia kuraca-

do nemalgrandan sumon kaj la hospitalo faris ĉion eblan por ekzameni kaj kuraci lin, tamen kiel flegi mian patron, kiŭ perdis la povon mem aranĝi sian vivon, fariĝis malfacile solvebla problemo. La familio dungis flegistinon por li, ĉar la hospitalo ne povis servigi al ĉiu malsanulo specialan flegistinon. Malfeliĉe, mia patro ne kontentiĝis pri la juna, malforta flegistino, kiŭ ne estis bone trejnita. En okazo de neceso ni ses (tri gefratoj kaj tri bogefratoj) alterne flegis mian patron. Post kiam lia malsano malgraviĝis, li elhospitaliĝis. En la hejmo mia patrino zorgas pri lia dieto, dum mia frato prenis sur sin ĉiujn aliajn taskojn, ekz. helpi lin fari resanigajn ekzercojn. Ĉiufoje, kiam mia patro volas eldomiĝi, mia frato portas lin surdorse de la kvara etaĝo malsupren.

Ĉio, kion mia frato faras por la patro, estas simpla devo en la okuloj de ĉinoj. En Ĉinio oni alte taksas “filecon” de la antikveco, t.e. la posteuloj devas prizorgi, flegi, vivteni siajn antaŭulojn kaj aranĝi ilian funebradon. Nunaj junuloj, kvankam influate de diversaj novaj konceptoj, ankoraŭ povas observi tiun tradicion. Jen kial multaj ĉinaj maljunuloj komisiis sian maljunecan al siaj gefiloj — ili estas fidindaj.

S-ro Tang laboras kiel ĉefredaktoro de iu revuo. Ĉiutage li, pli-ol-50-jara, hastas al sia hejmo por tagmanĝo. Mi demandis lin pri la kialoj. Li respondis, ke li havas maljunan patrinon en la hejmo. Tang bone plenumas sian filecan devon al la patrino. Li eĉ ne volas preterlasi tagmezon por akompani sian patrinon.

S-ino Sun laboras kune kun mi en la sama oficejo. Ŝi estas juna, tamen ŝi estas neniom malpli bona ol tiu de Tang en prizorgo de la patrino. Post la morto de sia patro ŝi maltrankviliĝis pri sia patrino, kiŭ vivis en la hejmo je mil km for de ŝi. Ŝi do veniĝis la patrinon al si. Por ke la maljunulino ne estu soleca en la hejmo, ŝi enskribis sian patrinon, por ke ŝi lernu en maljunula lernejo. En festoj kaj ferioj ŝi akompanis sian patrinon viziti kinejon, parkon aŭ vojaĝi aliloken. Ŝi faris ĉion ĉi, por ke ŝia

patrino feliĉe pasigu sian maljunecon.

Kompreneble, kiam oni admiras Tang kaj Sun, oni ofte sentas, ke ilia volo estas pli ol la povo. Kaj la maljunuloj, vidante, ke iliaj gefiloj, lacaj de la laboroj, daŭre klopodas por aĉeti legomojn, prepari manĝaĵojn kaj helpi la infanon en lernado, ne volas, ke ili faru plu. Sub tiuj cirkonstancoj la nocio de la homoj ŝanĝiĝis. Pli da homoj, inkl. de maljunuloj mem, deziras, ke la socio prizorgu ilin en ilia maljunecon. Aliflanke, en multaj jaroj la ĉina registaro dediĉis grandan atenton al starigo de perfekta socia asekura sistemo, diversaj sociaj bonstatigaj organizoj kaj diversaj loĝkvartalaj servoj por maljunuloj. Oni povas diri, ke tiuj laboroj jam donis aŭ donas efikon. Tio eble realigos la deziron, ke la socio solvu la problemojn por maljunuloj.

En kuracado de mia patro mi unuafoje spertis la oportunon de la socia servo. Mi informiĝis de amiko, ke en Pekino iu hospitalo faras servon per akupunkturo kaj mokso en la hejmo de pacientoj, je racia kosto. Post interkonsiliĝo kun la hospitalo kuracisto tuj venis al mia hejmo. Poste la kuracisto ne nur mildigis la malsanon de mia patro per akupunkturo kaj mokso, sed ankaŭ respondecis pri envejna pogutigado, aĉeto de medikamentoj kaj kuraca konsultiĝo en difinita tempo.

Oni informis al mi, ke estas multaj similaj servoj en Pekino, ekz. pluraj hospitaloj starigis hejmajn malsanulajn litojn.

Krome, vidiĝas en Pekino ankaŭ maljunulaj pensionoj, manĝejoj, babilejoj k.a.

Por la sanaj maljunuloj, kiuj povas mem aranĝi sian ĉiutagan vivon, la maljunulejoj estas idealaj lokoj. Efektive pli kaj pli multaj maljunuloj enloĝiĝis en ili. La maljunulejoj en la 50-aj jaroj akceptis ekskluzive maljunulojn seninfanajn kaj senmonajn, la nunaj maljunulejoj akceptas ankaŭ infanohavajn maljunulojn kaj pensiulojn. Ili tie vivas el sia pensio. Iuj maljunaj geedzoj eĉ kune transloĝiĝis en maljunulejon. Ili rigardas la maljunulejon kiel sian propran hejmon. Tie ili ne plu ĉagreniĝas pri manĝaĵoj kaj vestaĵoj nek maltrankviliĝas pro sia ĝenado al la gefiloj. Tie ili povas gaje babiladi kun aliaj, kanti pekinan operon, ludi ŝakon k.a.

Kompreneble la 40 000 maljunulejoj en Ĉinio ne povas kontentigi la 110 milionojn da maljunuloj. Tial, en sufiĉe longa periodo la ĉinaj maljunuloj pasigas sian maljunecon en diversaj manieroj. Menciindas, ke la 1-an de oktobro 1996 oni ekpraktikis la "Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko pri Defendo de la Rajtoj de Maljunuloj", en kiu oni ellaboris konkretajn artikolojn pri la socia asekuro kaj vivteno de la gefiloj kaj aliaj problemoj por la maljunuloj. Dank' al tio la maljunuloj havas leĝan garantion en la vivo. ■



En maljunulejo



Oni ne forgesis ŝian naskiĝtagon.

VIVO DE ĈINAJ EMERITOJ

ĈU printempe, ĉu somere, ĉe la ĉirkaŭfosaĵo kaj kvadrataj kortoj kaj sub arboj ekster la Imperiestra Palaco multaj maljunuloj fiŝadas, aŭskultas kantadon de birdoj, ludas ŝakon, sunumas sin kaj babilas. Malgraŭ okupiteco mi ŝatas veni en la vivon de emeritaj pekinanoj.

Nelerta en ŝakludo, maljunulo Li perdis sinsekvajn tri par-

tiojn. Pro tio iuj apudstarantoj mallaŭdis lin. Anstataŭ koleri, li stariĝis dirante: "Noktiĝas jam. Mi devas hejmen reveni por ripozi per profunda dormo."

Li vivas kune kun siaj filo kaj bofilino, kiuj laboras en ĉirkaŭurbo. Ĉiutage ili iras al laboro frue kaj li devas zorgi pri sia nepo vizitanta elementan lernejon. Frumatene li promenas

sur strato kaj tie prenas matenmanĝon. Poste li hastas hejmen por akompani sian nepon al la lernejo. Je la sepa surstratoj regas vigla trafiko. Por garantii la sekurecon de sia nepo la maljunulo devas akompani lin en transirado de stratoj. Tion farinte, li malrapide reiras hejmen laŭlonge de muro de la Imperiestra Palaco, kaj kantetas laŭtonoj el transistoro en la mano. Iafoje li haltas survoje por iom paroli kun aliaj maljunuloj, pipofumantaj ĉe la piedo de la muro. Tiutempe ne eblas al li ludi ŝakon,

ĉar tagmeze li devas revenigi sian nepon por manĝo. Tagmeze, kiam lia nepo siestas, li atendas la horon, en kiu li vekas sian nepon. La maljunulo dormetas nur post kiam li finas la akompanon. Kiam li vekigas, lia edzino preparas vespermanĝon en la kuirejo por la tuta familio. Je la momento li iras al la lernejo por revenigi sian nepon. La lasta iras ludante kaj postulas de li jen tion jen alion. El amo al la nepo la avo kontentigas lin per frandaĵoj sub la premo, ke li ne sciigu tion al sia patro, kiu malpermesas al sia filo preni ian ajn frandaĵon antaŭ manĝo en difinita tempo. Post la vespermanĝo la bofilino memvole purigas la manĝilaron kaj kuirejon anstataŭ sia bopatrino, kio kontentigas maljunulon Li. Profitante de la okazo, li eliras el la ĉambro kun sanigaj globetoj en la mano por sin amuzi sub arbo.

En la kvadrataj kortoj de Pekino loĝas ordinare trigeneraciaj familioj. Flegi nep(in)on ŝajne estas nepra tasko por emeritoj. Maljunulo Li laboris kiel tenej-gardisto de fabriko pli ol 30 jarojn. Post emeritiĝo li okupiĝis pri flegado de sia nepo kaj intertempe babilis kun siaj malnovaj najbaroj. Jam pasis ok jaroj de post kiam li komencis tian vivon. Kompreneble, ne ĉiuj emeritoj havas tian plezuron. Mi konas iun ĉefredaktoron de eldonejo emeritiĝintan. Li kaj lia edzino



En mateno



Avo instruas al sia nepino kaligrafadon.

zorgas pri siaj ĝemelaj nepoj, ĉar ties gepatroj portempe vivas alilande. La emerita ĉefredaktoro diris al mi: “Flegi niajn nepojn ja estas plezuro por ni. Tamen pro granda okupiteco en flegado mi ne havas tempon legi kaj verki.”

Miaopinie, ĉiuj gepatroj havas la rajton senzorge pasigi sian maljunecon post emeritiĝo kaj la gefiloj ne devas tro postuli de ili. Mi vivas kune kun mia patrino. Mi aparte atentis sian nutraĵ-konsiston kaj plurfoje konsilis al ŝi sporti ekstere anstataŭ televidi hejme tuttage. Mia patrino ofte diris al mi: “Estonte mi flegos vian infanon.” Sed mi pensis en mi: “Se mi havos infanon, mi certe ne lacigos ŝin per ĝi.” De la lastaj jaroj la koncepto de urbanoj pri

familio ŝanĝiĝas nerimarkite. Iuj gejunuloj preferas vivi disde siaj gepatroj kaj konfidisian infanon al servistino. Ordinare, la maljunaj gepatroj plezuras ĉe korpoezercado kaj promenado en proksima parko tiom longe, kiom ili volas. Ili bone manĝas kaj ripozas, kvankam kun iom da soleco. En ĉiuj ferioj aŭ festotagoj ili preparas bongustajn manĝaĵojn por pasigi la tempon kune kun siaj gefiloj kaj genepoj. La laboro estas laciga, tamen ili radias de ĝojo.

Mi pensis, ke vivi emeritan vivon signifas por eterne vivi de pensio. La okazintaĵo en la pasintjara foiro en Pekino por reenoficigi emeritojn havigis al mi novan konon pri tio. Antaŭ pli ol 60 standoj multaj emeritoj faris mem prezentadon kaj konsultadon. Element-lerneja instruistino Lŭ instruis pli ol 30 jarojn kaj emeritiĝis antaŭ duonjaro. Ŝi diris, ke ŝi sentas solecon sen siaj lernantoj kaj deziras instrui en privata lernejo. Laŭ informo el la Pekina Centro por Reenoficigi Emeritojn, gastiganto de la foiro, pli ol 25% de la enskribitaj emeritoj sukcesis reenoficigi. Preskaŭ ĉiuj maljunuloj sentas solecon nelonge post emeritiĝo. Por kiel eble plej rapide adapti sin al emerita vivo multaj el ili deziras trovi

oficon konvenan por ili mem. Tiuj emeritoj posedas solidajn faksciojn kaj spertojn akumulitajn en multaj jaroj. Ili estas tre bezonataj por privataj entreprenoj. Kaj la emerita vivo ne signifas por ili vivi senfare.

83-jara maljunulo Ye estis forstokulturisto. Antaŭ 15 jaroj li emeritiĝis kaj revenis al sia hejmloko. Apud ĝi kuŝas monto kaj fluas rivero. Ekster la riverdigo sterniĝas malprofundaĵo kun sennombraj ŝtonoj grandaj kaj malgrandaj. Por arbarizi la malprofundaĵon, ĉiutage li kolektis ŝtonojn kaj el ili konstruis digeton. En la unua jaro li arbarizis riverliton. Tamen inundo forportis centojn da liaj arbidoj. Post tio li sciigis, ke nepre necesas arbarizi la lokon, kiun inundo ne povas atingi. Nun sur liaj kampoj ĉirkaŭitaj de forstoj, digoj kaj kanaloj prosperas ricino, kolzo kaj tritiko. Li faris tion sole kun la celo ne vivi senfare. Li opinias, ke senfara vivo rapide maljunigas la homojn. De arbarizado li profitis multe kaj, antaŭ ĉio, li fariĝis pli fortika. Multaj vilaĝanoj diris, ke li ne aspektas kiel maljunulo pli-ol-80-jara.

En la kamparo plejparto de la maljunuloj laboras sur kampoj preskaŭ dum la tuta vivo. Perdinte laborkapablon, ili estas flegataj de siaj gefiloj. Kiel junulino, mi envias kelkfoje la emeritojn, kiuj povas decidi laŭ sia propra volo, kion ili faru kaj kion ne. Najbare de mia domo lokiĝas parko. Tie iu maljunulo rakontas ĉiutage historion kaj allogas al si multajn aŭskultantojn. Por pliriĉigi la temojn li kun plezuro studas historion, literaturon kaj teatron. Laca aŭ ĉagrenita, oni aŭskultas lian rakontadon por sin refreŝigi. ■

WEI YUANSHU SIN DEDIĈANTA AL E-INSTRUADO

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de LI CHUNGENG

LA Ŝanhaja Fremdlingva Aŭdvida Eldonejo, la unua kaj la plej granda en Ĉinio, sidas en la Ŝanhaja Universitato pri Internaciaj Studoj (antaŭe la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto). Dank' al prof. Wei Yuanshu, prezidanto de la Ŝanhaja E-Asocio, la eldonejo kun li kiel direktoro disvolvigis el malgranda entrepreno kun kelkaj personoj kaj kelkdek mil juanoj en potenca korporacion.

Hodiaŭ s-ro Wei famas en la ĉinaj aŭdvidaj eldonejoj kaj lia nomo aperis en libro de nomaro de ĉinaj entreprenistoj. Tamen li ankoraŭ inklinas al E-instruado en superaj lernejoj.

Diplomiĝinte el la fakultato de rusaj lingvo kaj literaturo de la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto en 1959, s-ro Wei laboris kiel instruisto en la instituto. En 1963 li kaj aliaj junaj instruistoj el 11 altlernejoj eklernis Esperanton en kurso

funkciigata de la Ministerio de Alta Eduko de Ĉinio. Post duonjara lernado li gvidis en la instituto kurson de Esperanto kiel dua fremda lingvo. Per sia vigla instruado li allogis multajn studentojn al la kurso. El liaj unuaj lernantoj 3 laboras nun kiel redaktoroj de la revuo "El Popola Ĉinio".

En 1978 s-ro Wei fariĝis vicdirektoro de la instituto. Kvankam tre okupita, li funkciigis E-kursojn en la instituto kaj en ĝia vespera lernejo, kun partopreno de multaj gejunuloj el la socio. Dank' al lia klopodo, la instituto fondis en 1984 la instruan kaj esploran sekcion de Esperanto, unikan en la ĉinaj superaj lernejoj. Post tio, li sinsekve 5-foje funkciigis E-kurson por altlernejaj instruistoj kaj kulturistoj por ĉinaj superaj lernejoj. Post tio, li gvidis poste en sia lernejo nedevigan E-kurson.

Kvankam en Ĉinio eldoniĝis multaj Esperantaj lernolibroj kaj legaĵoj, tamen mankis lernolibro por studentoj. Por kontentigi ilian bezonon, s-ro Wei kompilis "Lernolibro de Esperanto", kiun oni uzis por kurso de Esperanto kiel dua fremda lingvo en altlernejoj. Poste li eldonis ankaŭ "Fonetiko de Esperanto", "Gramatiko de Esperanto", "Krestomatiko de Esperanto" kaj aliajn librojn, el kiuj "Gramatiko de Esperanto" kune



Libroj kompilitaj de s-ro Wei Yuanshu

kompilita de li kaj aliaj estis tre ŝatata kaj vaste uzata de ĉinaj esperantistoj. Tiuj libroj multe helpis kaj progresigis instruadon de Esperanto en ĉinaj superaj lernejoj.

En 1985, komisiita de la Ĉina Eduka Ministerio kaj la Ĉina E-Ligo, s-ro Wei gvidis la ellaboradon de la E-instrua programo por superaj lernejoj. La programo klare difinis la instruajn celon, principon, metodon kaj materialon kaj la lernojaron, lecionkiomon, ekzamenon k.a. Dank' al tio, instruado de Esperanto en superaj lernejoj rimarkinde disvolviĝis.

Dum instruado de Esperanto s-ro Wei donis grandan atenton al esplorado kaj aplikado de E-instrua metodo. Li studis la teorion de lingvistiko kaj fremdlingvo-instruajn metodojn, lernis alies instruan sperton kaj esploris E-instruan metodon konvenan al studentoj, tiel ke li sukcesis en Esperanta instruado. Pri tio li skribis artikolojn, kiuj aperis en "Fremdaj Lingvoj", "La Mondo" kaj aliaj periodaĵoj.

Iniciatite de s-ro Wei, la Ĉina Societo de E-Instruado en Superaj Lernejoj starigis en 1989. S-ro Wei estis elektita kiel ĝia prezidanto kaj ĉefredaktoro de ĝia organo "Esperanto en Superaj Lernejoj". Ĝis nun la societo 4-foje okazigis seminarion.

Multe esplorante aplikon de elektraj aŭdvidaj aparatoj al instruado, s-ro Wei laboris ankaŭ kiel la unua direktoro de la Domo de Aŭdvida Edukado de la Ŝanhaja Universitato pri Internaciaj Studoj. En 1988 li ekfunkciis kiel direktoro de la Ŝanhaja Centro de Fremdlingva Eduka Tekniko kaj de la Ŝanhaja Fremdlingva Aŭdvida Eldonejo. Gvidate de li, la eldonejo ellaboris rigoran scienc-administran sistemon. Ĝiaj instruaj sonbendoj kun Esperanta marko AV (Ami Venontecon) de pli ol 300 specoj, en 13 lingvoj, inkl. de Esperanto, estas tre ŝatataj

en la merkato.

Nuntempe, s-ro Wei daŭre laboras kiel direktoro de 2 AV-kompanioj de la nomita eldonejo kaj ĝenerala direktoro de 2 aŭdvidaj eldonaj korporacioj. Li uzas parton da enspezoj de la eldonejo kaj kompanioj por la Esperanta afero, ekz., subvencii la Ĉinan Societon de E-instruado en Superaj Lernejoj kaj eldoni Esperantajn lernolibrojn kaj sonbendojn.

De longe s-ro Wei laboras ĉefe por fremdlingvaj aŭdvidaj eldonaĵoj kaj distribuado, tamen li neniam forgesis Esperanton, prof-

itante ĉiujn okazojn por studi kaj disvastigi Esperanton. En la lastaj jaroj li kompilis kaj eldonis "Elektitaĵoj el Gramatiko de Esperanto" kaj "Konciza Ĉina-Esperanta Vortaro". En 1996 li gvidis E-kurson en la Informo-komunika Instituto de la Ŝanhaja Universitato pri Internaciaj Studoj kaj fondis E-societon de la universitato.

S-ro Wei plurfoje partoprenis UK. En 1996 okazis en Ŝanhajo la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Kiel prezidanto de ĝia Loka Kongresa Komitato, li multe laboris por ĝia sukceso. ■

Petu de la aŭtoro ĵus finitan manuskripton anglalingvan (246-paĝa) kun aŭtor-rajtoj, sed ankoraŭ ne publikigitan (50 usonaj dolaroj inkl. sendkosto).

"The Great Leap of Mind: Unitary Perception (Vital Dialogues)"

aŭ **"Beyond my History"** (15-paĝa enkonduko) 10 usonaj dolaroj inkl. sendkosto.

De Rubén Feldman González, M.D. aŭtoro de "La Nova Paradigmo en Psikologio" (259-paĝa) 2 usonaj dolaroj ĉe UEA, kaj kunfondinto de Pasporta Servo de TEJO.

La aŭtoro dialogis dum 11 jaroj kun Krishnamurti kaj David Bohm. Ankaŭ Karl Pribram, B. Skinner, M. Mahler, la Rahulo, kaj kelkaj Rimpoĉes kaj ankaŭ kun kelkaj famaj kristanaj monaĥoj.

Li preleg-vojaĝis 36-foje tra Amerikaj Universitatoj de 1978 ĝis nun por prezenti la temon **"Unuiĝanta Perceptado"**.

La aŭtoro akceptos ĝoje invitojn por prelegi pri Unuiĝanta Perceptado.

P.O. Box 74603

Fairbanks, Alaska 99707-USONO

Tel: (907) 452-1575 Fax: (907) 451-7024

E-mail: 103163,3356@compuserve.com

Web-Site: <http://ourworld.compuserve.com/homepages/Rufegon>



S-ro Wei Yuanshu (meze) en la 79-a UK en Seulo



S-ro Wei Yuanshu (maldekstre)



S-ro Wei Yuanshu (dekstre) kaj liaj kolegoj de la eldonejo vizitis Japanion en 1992.



S-ro Wei Yuanshu (la dua de maldekstre) gastas en EPC-redakcio.



S-ro Wei Yuanshu (meze) en la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Sanhajo



S-ro Wei Yuanshu (staranta) en la Simpozio Lu Sin kaj Esperanto

Poemoj el Vjetnamio



S-ro Dao Anh Kha

Perlostro

de DAO ANH KHA

*Mi ostro en mara profundo kuŝinte tenebra
Marondojn kaj ventojn eĥadis per konko funebra
Dormeme songeme tra l'tempoj eraoj fi-spitis
Marŝtormojn terskuojn aŭdadis kaj mokis kaj rid*

*Subite vekite de kanto de bela Siren'
Mi tremis doloris veadis en mia gehen'
Jarmilojn katenis min tiel la konka kaverno
Hodiaŭ mi mortas kristale transforma... en perl*

Korea koro

de FENIKSA HOANG MINH PHUNG

*Montoj ĉi-tie... Ankoraŭ montoj!
Vojoj serpentas kiel ondoj
Suno brilas
Mateno trankvilas.*

*Ebriiĝas mi en fluo dronanta
ekstazan vivofonton donanta
Ĉarmas min Nacia malva flor'
Kaj knabaj vestaĵoj kun buntkolor'
Kaj gracia rideto de l' ino gastema
kaj varma manpremo de l' gento helpema
Ĉio en memor' penetriganta
En menso mia neniam forgesanta*



S-ro Feniksa
Hoang Minh Phung

*Dolĉa horo
En Korea koro!*

Memore al Armand Su*

de DANG DINH DAM

*Ĉi-printempe, plibelas nia amikeco
Danke al karaj ĉin-samideanoj,
Via verko kuŝas sur mia tablo,
Elvekante min en tuja legado.*

*Pri vi mi aŭdis jam delonge,
Sed nun mi povas pli kompreneme,
Viaj viv-sorto kaj bel-verkaro
Kare emociigas verdan tutmondon.*

*Mi rakontos pri vi al vjetnamoj
Per miaj sinceraj tradukaĵoj.
Eble vi permesu bonvole,
Ĉu bele aŭ ne mi faris elkore.*

*Jen «Vjetnama najbarineto»
Ĉarmas antaŭ via rigardo.
Plibelas ĉi knabino plikreske,
Por ke vi sentu vin jaluze.*

*Sciata, ke «en la bela revo»,
Knabino kara prizorgis pri vi ame.
Malgraŭ nokto kurta, senpromeso,
Revenos l' amatin' reve fabele.*

*Ja vi diris «adiatun al amo»
Aŭ pripensas pri «Tarda pento»,
Sed via verko montras arte, eterne
Koro via ĉiam bolas ameme.*

*Mi esperas ke vi dormu trankvile,
Ĉar en la mondo verdula ĉie,
Dividas kun vi ĉiujn amarojn misajn
Ĝuante de vi perlojn pure viv-amajn...*

* Okaze de la 60-a datreveno de lia naskiĝo
(1936-1996)



S-ro Dang Dinh Dam

ESP-NOVAĴOJ

ĈINIO

● La 12-an de oktobro 1996 la Xinxiang-a Esperanto-Asocio de Henan-provinco faris raporton pri E-o en la Xinxiang-a Proviza Kolegio. Post la raporto multaj lernantoj de la kolegio deziris lerni E-on. Pli ol 130 personoj partoprenis la kurson, kiu komenciĝis en la 19-a de oktobro kaj kiun gvidis Zhu Minghe, asista ĝenerala sekretario de la asocio. (Han Daozhu)

● En la urbo Zaozhuang, Shandong-provinco, aktivis junaj e-istoj. En la lastaj tagoj ili multfoje renkontiĝis kaj nun sin preparas por fondi junularan fakon sub la Zaozhuang-a E-Asocio. (Liu Yanchun)

PAKISTANO


● En la 15-16-a de aŭgusto 1996 okazis en Murree la 19-a Somera Kongreso de la Pakistana E-Asocio. (Amjad Butt)



Partoprenantoj de la 19-a Somera Kongreso de la Pakistana E-Asocio

VENEZUELO

● En la kulturo-domo de Maracaibo, nomata "Domo de la Tri Fenestroj", okazis la 100-a E-kurso de la regiono, gvidata de prof. David G. Valecillos. Dume oni ekspoziciis belajn Esperantaĵojn. La novaj kursanoj bezonas lerno-materialon. Tiuj, kiuj povas helpi ilin, bonvolu kontaktiĝi kun la Venezuela E-Unuiĝo. (David G. Valecillos)



Ukrainaj esperantistetoj en Francio

UKRAINIO ● FRANCIO

● En Kievo, urbo ĝemeligita kun Toulouse, ekzistas speciala lernejo, kie infanoj lernas kvin fremdajn lingvojn kaj komencas ekde la dua lernojaro lerni la kvinan devigan lingvon Esperanto, kiun tiuj infanoj lernis dum unu jaro kun instruisto Mikael Linetski. Por paroli Esperante kun francaj infanoj, 9 liceanoj el Kievo kun akompanantino Larissa Linetskaja, post 3-tagnokta vojaĝo, alvenis gastigantajn familiojn de Ste Foy d' Aigrefeuille, je 15 km de Toulouse, kiuj sin preparis tutan jaron por tiu akcepto. La alveno de ukrainaj infanoj kaj la varma akcepto al ili en la urbodomo, konsistigas gravan eventon por la vilaĝaj enloĝantoj, kaj tio estis bela aventuro por tiuj 9 ukrainaj infanoj.

(Jeanne-Marie Cash)

DANIO

● De la 11-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1996 okazis Esperanto-semajno en Martinus-Centro. La semajnon partoprenis 40 personoj, 20 el Danio kaj 20 el Svedio, Norvegio, Rusio, Ukrainio, Ĉeĥio, Usono kaj Aŭstrio. El la lastaj 20 personoj ne malpli ol 12 venis de Rusio. La Esperanto-semajno estis tiel sukcesa, ke oni tuj decidis aranĝi novan Esperanto-semajnon en la 10-16-a de aŭgusto 1997. Kontakta adreso: Mariendalsvej 96, DK-2000 Frederiksberg, Danio. (Poul Dyrholm)

RUMANIO

● La 28-an de septembro 1996 la rumana televido "Eŭropo Nova" (Timisoara) organizis 75-minutan intervjuon pri Esperanto en horo de granda aŭskultanteco. Surbaze de ĉirkaŭ 30 demandoj prof. d-ro Ignat Florian Bociort, honora prezidanto de la Rumana Esperanto-Asocio, prof-ino Florika Popa, ĝenerala sekretario de REA kaj ing. Dorin Hehn, prezidanto de REA klarigis plurajn aspektojn de la Esperanto-ideo kaj movado. La gvidantaro de televido "Eŭropo Nova" decidis tuj organizi Esperanto-telekursojn. (Florika Popa)

HUNGARIO

● Printempa Festivalo en Budapeŝto okazos inter la 21-27 de marto 1997, inkluzive viziton de artaj prezentadoj en la Hungara Ŝtata Operejo, en la Muzika Akademio Ferenc Liszt, en la Kongresa Palaco kaj viziton de ekspozicioj de artaĵoj: Hungara Nacia Galerio (en iama reĝa palaco), Belarta Muzeo, Arta Halo de Budapeŝto, Preĝejo Matiaso, Placo de Herooj. Partoprenkotizo: 230 gld. La 2-a Eŭropa Esperanto-Festivalo okazos en la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1997 en Budapeŝto kun ĉeftemo: Komunikado en internaciaj organizoj. Aliĝkotizo: 18-38 gld. Adr.: Hungara Esperanto-Asocio, H-1396 Budapeŝto, pf. 193, Hungario.

(Hungara Esperanto-Asocio)

POSTSKRIBO DE LA SEPA VOLUMO DE "KOLEKTO DE TRADUKOJ DE BAKIN"

Bakin, alteestimata 93-jara verkisto de Ĉinio, ne nur multe verkis nacilingve, sed ankaŭ multe tradukis el fremdaj lingvoj, inkluzive Esperanton. Post la apero de lia verkaro, oni eldonos ankaŭ lian tradukaron, kiu ampleksos 10 volumojn. Al ĉiu volumo Bakin aldonis mallongan postskribon por rakonti, kiam kaj kial li faris la tradukojn kaj kiamaniere ili publikiĝis. La sepa volumo de tiu ĉi kolekto konsistas ĉefe el elesperantaj tradukoj, kaj ankaŭ al tiu ĉi volumo li aldonis postskribon antaŭ nelonge. Jen ni aperigas tiun postskribon en Esperanto por montri, kiel Bakin pasie amas nian lingvon kaj kiom multe li kontribuis al nia afero. Li ja meritas la honoron esti membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

La Red.

LA enhavo de tiu ĉi volumo konsistas el sep beletraĵoj verkoj, nome, kvar dramoj, mallonga romano, kolekto de noveloj kaj kolekto de poemoj. Krom la kvarakta dramo "Profunda Nokto", la aliaj tri estas tradukitaj el Esperanto. La mallonga romano "Printempo en la Aŭtuno" estis originale verkita en Esperanto. En la kolekto de noveloj kun la titolo "Rido" troviĝas du noveloj tradukitaj el Esperanto. En la "Kantoj de Ribeluloj¹" la rusa popolkanto "Volgo, Volgo" estis ĉinigitaj el sia Esperanta versio.

Mi eklernis Esperanton en Nankino en 1924-25. Antaŭe, kiam mi restis en Chengdu², mi jam verkis artikolojn por rekomendi Esperanton. Je la fino de 1928 mi revenis de Francio al Ŝanhajo, kaj pere de mia amiko Sofio³ mi aliĝis al Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Mi eĉ loĝis en la oficejo de ŜEA por proksimume unu monato, ĝis kiam mi sukcesis lui loĝejon. Tiam, Sofio ĵus edziĝis kaj ankaŭ por li necesis lui loĝejon. Ni ambaŭ do kune luis domon sur Baoguangstrateto. Mi loĝis en la posta dua etaĝo kaj laboris en la unua etaĝo



S-ro Bakin

salono. Kiel antaŭe, Sofio laboris kiel direktoro de la Esperanto-asocio. Li deĵoris tie ĉiuvespere kaj li petis, ke mi lin akompanu.

Post vespermango ni duope piediris al Hongxingfang, kie lokiĝis la sidejo de ŜEA. Mi korektis la ekzercaĵojn de anoj de la koresponda kurso. Ne estis multaj la ekzercaĵoj kaj ili estis facile prilaboreblaj. Kio ĝojigis min, estis, ke tie troviĝis du ŝrankoj da libroj kaj periodaĵoj Esperantlingvaj. Tiam, mi ne havis mul-

tan laboron, mi do havis la oportunecon tralegi tiom da Esperantaj libroj kaj revuoj. Tio ja ege min kontentigis. Tiutempe mi multe legis kaj ankaŭ abunde verkis.

Dimanĉe posttagmeze, ni iris al la oficejo por partopreni la aktivadojn de ŜEA-anoj. Kaj dank' al tio mi ekhavis multajn amikojn. Mi tre ŝatis tiun lokon. Sed pasis apenaŭ tri jaroj, eksplodis la Evento de la 18-a de Septembro⁴, Sofio transloĝiĝis kaj ne plu deĵoris en ŜEA-oficejo. Post nelonge, la sidejo de la Esperanto-asocio kaj la du ŝrankoj da valoraj libroj estis detruitaj de la kanonoj de la japanaj invadintoj⁵. Ekde tiam mi iom post iom perdis kontakton kun tiuj sinceraj kaj fervoraj amikoj, kaj pri ili mi ankoraŭ sopiras.

Tiam mi komencis traduki Esperant-lingvajn beletraĵojn ĉinlingven. Dum 3-4 jaroj mi tradukis kvar literaturajn verkojn. Escepte de "Danco de Skeletoj", la tradukitaj libroj estis ĉiuj pruntitaj el ŜEA-oficejo. La libro "Danco de Skeletoj", ĝuste kiel la tradukinto skribis en sia antaŭparolo, estis aĉetita ĉe la budo de eluzitaj libroj apud la rivero

Seine en Parizo. Tiu libro de Esperanta traduko enhavis tri mallongajn dramojn. La aŭtoro Akita Ujaku estis esperantisto, kies homama ideo ja tuŝis min. Post multaj jaroj mi renkontis s-ron Akita Ujaku en Tokio. Li alvenis por ĉeesti la adiaŭan kunvenon okazigitan de ĉina verkista delegacio. Sed estis neatendite, ke nia unua renkontiĝo en la jaro 1961 estis samtempe la lasta. Kiel 78-jara maljunulo, li ankoraŭ havis plenplenan homamon en sia koro kaj kredis, ke printempo neniam pereos kaj fontano kaj herbejo por la tuta homaro nepre estos. Post sinmortigo de lia nepino li organizis por la junuloj Asocion de Senmorta Birdo⁶ por kuraĝigi ilin strebi al vero, persisti en batalo, neniel forlasi sian respondecon kaj absolute ne cedi antaŭ malfaciloj. Li diris al la japana junularo: “Alte taksu vian propran vivon sub ajna malfavora kondiĉo, varme amu la vivon, penadu por reformi la hodiaŭan socion.”

La “Danco de Skeletoj” estis dufoje eldonita de Kaiming-Eldonejo. La tradukinto uzis “Yiqie” (Signife “Ĉio”) kiel sian pseŭdonimon kaj la legantoj ne sciis, kiu li estas. Ĝi ne estis represita en la postaj jaroj. El la aliaj tri tradukoj “La Floro de l’ Pasinto” verkita de E. Amicis publikigis en la “Monata Revuo de Noveloj” en la jaro 1930, poste, dank’ al la aranĝo de Sofio, ĝi aperis en broŝur-formo, kiu estis jam antaŭ longe elĉerpita kaj ne plu reeldoniĝis. En la jaro 1940 oni kolektis ĝin en la “Kajereto de Tradukoj” eldonita de la Eldonejo “Kultura Vivo” kaj poste ĝi ankoraŭfoje publikigis. Kiam “La Morto de Danton” de A. N. Tolstoj estis eldonota de Kaiming-Eldonejo, mi aldone verkis la artikolon “Rakonto pri la Franca Revolucio” laŭ peto de la redaktoro. Ankaŭ tiu libro ne estis represita. Nur la mallonga romano “Printempo en la Aŭ-


tuno” verkita de la hungara esperantisto Julio Baghy cirkuladis ĝis hodiaŭ. Ĝi rakontas pri du orfoj, kiuj renkontiĝis en bazaro kaj vidis printempon en aŭtuno. Dum la 30-aj jaroj ĝi altiris multajn junulojn.

Dum la kompilado de tiu ĉi volumo, eĉ la tralegado de amiko per mallaŭta voĉo memorigis min pri multaj aferoj. Post la detruo de ŜEA-sidejo mi havis la okazon refoje studi Esperanto-literaturon dum la dek jaroj de inkubsonĝo⁷. Vekiĝinte el la sonĝo, mi diris, ke mi volas dediĉi mian lastan energion al la sociaj aferoj inkluzive la Esperanto-movadon. En la jaro 1980, instigite de mia estimata amiko Hujucz⁸, mi vojaĝis al Stokholmo por ĉeesti la Universalan Kongreson. Tiam mi ankoraŭ kredis, ke mi povas multe fari por la Esperanta afero. Kion mi vidis kaj aŭdis dum la stokholma kongreso, ekscitis mian konvinkon. En kunestado de la geamikoj mi vidis la brilan perspektivon. Mi kredis, ke la komuna lingvo por la tuta mondo certe rapide progresos. Sed, tute neatendite, mi falis teren kaj eksuferis de frakturo en la jaro 1982 kaj samtempe oni trovis, ke min trafis parkinsona malsano. Mi pli kaj pli velkis kaj jam pli ol dek jarojn baraktis kontraŭ la malsano. La promeso de sindediĉo al Esperanto fariĝis simpla vanaĵo. Mi ege hontas, kiam mi pensas, ke mi ne plenumis ĝin al miaj amikoj.

La teksto de tiu ĉi volumo estas bazita sur la versio aperigita en la libro “Bakin kaj Esperanto”⁹ kompilita de s-ano Xu Shanshu. Mi neniam renkontis tiun s-anon, mi nur korespondis kelkfoje kun li. Kompilante tiun libron, li tre serioze penadis por kolekti miajn tradukojn. Li laboris malgraŭ sia malsano, kaj kiam la libro eldoniĝis, li jam forpasis. La lingvokontrolon faris s-ano Li Shijun¹⁰. Mi dankas lin, ke li korektis miajn erarojn. Mi

malfacile moviĝas kaj skribado por mi estas malfacila. Mi havas multon por diri, sed mi ne povas libere skribi tiom, kiom mi volas. Mi dediĉas tiun ĉi volumon al la amikoj de Esperanto-movado kaj per ĉi tiu mallonga skribaĵo esprimas mian senfinan dankon. Mi diras adiaŭon al la esperantistaj amikoj. Vi ĉiuj restas en mia koro kaj mi vin benas. La perspektivo de Esperanto estas esperplena. ■

1. Bakin metis siajn tradukitajn poemojn en kolekton kaj titolis ĝin “Kantoj de Ribeluloj”.
2. La ĉefurbo de la provinco Sichuan, kie loĝis Bakin dum sia juna aĝo.
3. Ĉina veterana esperantisto, kiu multe laboris por Esperanto-movado dum la 20-aj jaroj.
4. Je la 18-a de septembro 1931, la japanaj invadintoj ekatakis la urbon Shenyang (en la nordorienta parto de Ĉinio) kaj ĝin konkeris. Tio signifas la komenciĝon de japana agreso kontraŭ la tuta Ĉinio.
5. Je la 28-a de januaro 1932, la japanaj agresintoj lanĉis atakon kontraŭ Ŝanhajo kaj kaŭzis grandan damaĝon al la norda parto de tiu urbo. La sidejo de ŜEA troviĝis ĝuste en tiu distrikto kaj detruigis.
6. La senmorta birdo estas fenikso. Laŭ PIV, fenikso estas birdo, kiu ĉiuentjare mortas en flamoj kaj renaskiĝas el sia propra cindro. Verŝajne Akita uzis ĝin kiel simbolon de ĉiama juneco.
7. Per tio Bakin aludis la t.n. kulturalan revolucion de 1966-1976, kiu fakte estis terura katastrofo.
8. Hujucz (1896-1986), veterana ĉina esperantisto, politika gravulo, iamaj UEA-delegito kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.
9. Ĉinlingva libro eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo. La kompilinto Xu Shanshu (1922-1994) estis membro de la Komitato de ĈEL kaj iama vicdirektoro de EPC.
10. Li Shijun, pseŭdonime Laŭlumo, renoma ĉina esperantisto, membro de la Akademio de Esperanto.



Du poemaroj en Esperanto kaj nacia lingvo

de LAŬLUM

60 ESPERANTO-POEMOJ VJETNAMEN TRADUKITAJ de Dang Dinh Dam, eldonita de la eldonejo Mondo okaze de la 60-jara Jubileo de naskotago kaj la 35-jara aktivado de Esperanto de s-ro Dang Dinh Dam. Formato 9 × 13 cm. 188 p. Prezo ne montrita.

Jen kolekto de 60 poemoj verkitaj de L. L. Zamenhof, Julio Baghy, K. Kalocsay, A. Grabowski, E. Privat, V. Eroŝenko, W. Auld, M. Boulton, G. Matos, G. Deŝkin k. a. esperantistoj kaj Heine, S. Petofi, T. Ŝevĉenko, k.a. mondfamaj poetoj en Esperanto kun vjetnamaj versioj de s-ro Dang Dinh Dam en kontrasto kun la originaloj. Ĉar la poemoj "Ho mia kor!", "Mia penso", "La tagiĝo", "La amo kaj liber" ktp en la kolekto estas tiel popularaj, ke estas superflue paroli ĉi tie pri ili. En la libro ilustrita per portretoj, desegnaĵoj kaj vinjetoj troviĝas 6 poemoj de s-ro Dang Dinh Dam plejparte memore al vizitoj de alilandaj esperantistoj al Vjetnamio. Pri la tekstoj en la vjetnama mi, sen scio de tiu lingvo, povas diri preskaŭ nenion. Tamen mi kredas, ke la tradukoj helpas la vjetnamajn legantojn pli bone koni la poemojn en Esperanto. Tio ĉi ja signifas grandan bonon por la vjetnama E-movado en la nuna tempo, kiam mankas al ĝi legoli-

broj por la progresantoj. Tial mi gratulas s-ron Dang Dinh Dam kaj la eldonejon Mondo pro tiu ĉi sukceso.

VARIACIOJ PRI LA REALO de Geraldo Vakano, esperantigita de Amerigo Janakono, eldonita de EVA. Formato: 14.3 × 21 cm. 129 p. Prezo ne montrita.

La poemaro de itallingvaj poemoj kun Esperantaj tradukoj en kontrasto konsistas el tri partoj: 1. "Variacioj pri la realo" kun 12 versaĵoj; 2. "La poetoj" kun 14 versaĵoj; 3. "La montaninoj" kun 10 versaĵoj. La tradukinto diras en sia "Antaŭparolo": "Pinto de la pripensado de Vakano estas la senmaskigo de la realo (de la blufoj de la realo) por igi ĝin malpli timinda kaj pli akceptebla." Kaj tion ni povas senti legante lian unuan poemon en la kolekto:

*Ni demetu la maskon
al la realo aŭ igu al ĝi
la vizaĝon pura.*

*Ni redonu ĝin al ĝi mem,
igu ĝin pli modesta,
pli natura.*

*Ĝi maskiĝas (ĝin oni maskas)
sin alivestas, sin ŝminkas,
sin kamuflas, sin kaŝas
sed ekzistas.*

Certe: ĝi ekzistas.

En la dua parto ni povas legi versojn pli facilajn, tamen ankaŭ

foje filozofiajn, ekz. "La cikadoj":

*La cikadoj, kiujn mi tre ŝatas,
ne venas kanti
sur la arboj de mia kampo
aŭ de mia ĝardeno
(olivaj, nuksaj, pinaj).
Ili kantas ĥore,
festas ĝisvespere
sur la arboj de mia najbaro
(olivaj, nuksaj, pinaj),
kiu ilin abomenas.*

En la tria parto estas versaĵoj pri la ĉiutaga vivo, ekz. "La montaninoj":

*Komence de l' printempo
la montaninoj de Alta Sangro
antaŭeniris ĝis la vido
de Kumina Valo,
por kontroli la koloron de l'
kampoj.*

*Se ili vidis ilin tro verdaj,
ili reiris hejmen maltrankvilaj:
la grenejoj riskis resti malple-
naj.*

*Iu frosto en aprilo aŭ en majo
povus mortigi la plantojn
kreskintajn rapide,
la spikojn tro fruecajn.*

Por helpi la legantojn, la tradukinto kiel la aŭtoro mem donis dekojn da notoj je la fino de la poemaro. Malgraŭ tio mi trovis, ke kelkaj esprimoj ne estas facile digesteblaj. ■



Tibetanoj kun preĝ-rado en la mano

Foto de Du Zequan

Budhismo radikas en Tibeto

de LI QIANG

Hieraŭ (la 8-an de julio 1996) ĉi tie en ĵurnalo publikigis artikolo pri Tibeto. La artikolo diras, ke en Tibeto multaj temploj estis senkompate detruitaj kaj la tibeta budhismo jam likvidiĝis el la cerbo de tibetanoj. Nun mi sendas ĝin al vi kun espero, ke vi publikigos artikolon koncerne tiun problemon.

ERNST DIEDRICH (Germanio)

LA tibetanoj estas religia nacio. Antaŭ 1 300 jaroj en Tibeto regis la primitiva fetišismo *Ben*-religio. En la 5-a jc budhismo enkondukigis en Tibeton kaj post 200 jaroj ĝi iom post iom prosperiĝis en la loko.

La tibeta budhismo havas altan pozicion en Tibeto. Hodiaŭ ĉiuj

turistoj, kiuj vojaĝis en Tibeto, sentis fortan religian etoson. Ĉie vidiĝas temploj, aŭdiĝas frapado de ritiloj kaj sutro-recitado. La rozarioj pendantaj sur la brusto de tibetanoj, la preĝradoj turnataj en la manoj, la flag-rubandoj flirtantaj super dom-tegmentoj, la gigantaj statuoj kaj budhismaj freskoj en la temploj, la genuado de piaj

budhistoj kaj ilia adorkliniĝado sub buteraj lampoj, ĉio ĉi odoras fortan religian etoson.

RELIGIA KREDO TRA TIBETO

La ĉina konstitucio tekstas, ke la civitanoj de la Ĉina Popola Respubliko havas liberon de religia

kredo kaj la normalaj religiaj aktivadoj estas protektataj de leĝoj. Tio ne estas escepto ankaŭ en Tibeto.

Antaŭ 1951, kiam Tibeto estis pace liberigita, kvankam oni rajtis kredi je budhismo, tamen tiam granda nombro da servutuloj kaj paŝtistoj-sklavoj sen persona libero ne povis partopreni en religiaj aktivadoj. La ordinaraj kamparanoj kaj paŝtistoj tre malofte partoprenis religian aktivadon pro manko de tempo kaj mono. Post la paca liberiĝo la servutuloj emancipiĝis, la socio evoluis, la popola vivnivelo levigis, la religia vivo de la tibetanoj estis garantiata kaj fine realiĝis la libero de religia kredo en koncepto kaj ago.

16 fakuloj de la Esplora Centro de Tibetologio de Ĉinio venis al Tibeto en 1995 kaj tie faris sciencon esploron pri 100 familioj. Oni konstatis post la esploro, ke el la politikoj praktikataj en Tibeto tiu pri la libero de religia kredo estas la plej bone konata de 93.2% de la tibetanoj. Oni faris enketon al la 44 familioj de Bancun-vilaĝo. La enketo montras, ke en la vilaĝo 28 familioj faris religian riton en siaj hejmoj kaj iuj el ili faris tion du fojojn en unu jaro. En bonaŭguraj tagoj de la religio la vilaĝanoj plejparte pilgrimas al temploj. La 8-an, 10-an, 15-an, 25-an kaj 30-an de ĉiu monato laŭ la tibeta kalendaro preskaŭ ĉiuj familioj pilgrimas per kaleŝo al temploj.

La enketo montras ankaŭ, ke la elspezo por religiaj aferoj konsistigas rimarkindan parton de la familia elspezo. Ni prenu Bancun-vilaĝon kiel ekzemplon. Antaŭ la liberiĝo en la vilaĝo ses familioj vivis kompare bone, sed el ili nur tri havis budhan niĉon kaj tiam la ununura religia bezonaĵo por plejparto de la tieaj familioj estis argila lampo. Nun en la 44 familioj estas 23 niĉoj, 10 argilaj budhostatuoj, 33 volumoj da budhismaj sutroj kaj iuj aliaj ritiloj.

Nun budhismo profunde enradikiĝis en la koro de la tibeta popolo kaj budhismaj aktivadoj okupas gravan lokon en ilia vivo. Ĉu

grava tradicia religia festo, ĉu loka religia festo, ĉu nupto, ĉu funebro, ĉu domkonstruado, ĉio iras laŭ la antikvaj religiaj procedoj. Plej evidentiĝas tiuflanke, ke la serĉado kaj konfirmo de la reenkariniĝinto de Banĉen Erdini la 10-a, lia oficiala herediĝo kaj aliaj gravaj aferoj estas faritaj surbaze de la tibetaj religiaj ritoj.

Ĉiujare pli ol 100 000 pilgrimantoj veturas al Lhasa, ĉefurbo de Tibeto, multe pli ol antaŭ 1959, kiam Tibeto faris demokratian reformadon.

La tibetanoj bone scias, ke sen plena libero de religia kredo la religiaj tradicioj en Tibeto ne povus esti bone konservitaj kaj sen sociekonomia evoluo kaj levigo de la popola vivnivelo neeblus al ili havi la ŝancon partopreni religiajn aktivadojn.

TEMPLOJ EN TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ

Kiel ejoj por tibetaj budhismaj aktivadoj la temploj en Tibeto estas ankaŭ centro de la tibeta kulturo. Antaŭ la demokratia reformado en Tibeto estis ĉ. 2 000 temploj.

De 1951, kiam Tibeto pace liberiĝis, ĝis 1966, kiam en Ĉinio komenciĝis la kultura revolucio, en la tuta Tibeto la temploj estis bone protektataj kaj religiaj aktivadoj de la lamaoj estis bone faritaj. Tamen oni devas konfesi, ke en la sekvantaj 10 jaroj, kiel aliaj lokoj de Ĉinio, ankaŭ Tibeto estis en tumulto. Iuj temploj estis detruitaj. Eĉ tiutempe la ĉina registaro ordonis protekti Potala-palaco kaj la templojn Jokhang, Drepung kaj Tashilhunpo. En tiuj temploj denove iris religiaj aktivadoj post la 10-jara ĥaoso.

Tiuj temploj estas gravaj historiaj restaĵoj de Ĉinio. La registaro ĉiujare asignas sumon da mono por ripari ilin. La fama budhisma Potala-palaco estis grandskale riparita en la 17-a jc kaj post tio oni neniam faris al ĝi tian riparadon. En 1988 la ĉina registaro decidis komplete ripari ĝin. Aro da tibetaj artistoj kaj konstruantoj plenumis

kompletan riparadon al la palaco en kvin jaroj, strikte observante la principon alte taksi sciencon, tradicion, nacian moron kaj religian bezonon. Kaj plie, oni plifirmigis la stupaon kaj halon por Dalailamao la 5-a. Tio estis la plej grandskala riparado de historiaj restaĵoj en la pasintaj 45 jaroj. Por tio oni elspezis 50 milionojn da juanoj (egale al ses milionoj da usonaj dolaroj). Post nelonge la ĉina registaro asignis specialan monsumon por konstrui la stupaon kaj halon por Banĉen Erdini la 10-a.

De 1980 la ĉina registaro kaj la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kune asignis monon por rekonstrui centojn da temploj kaj ripari pli da temploj. Nun en Tibeto estas pli ol 1 400 temploj. Koncernaj departementoj de la aŭtonoma regiono liveris al ili multajn kuprajn budhostatuojn kaj aliajn religiajn objektojn.

En Tibeto estas granda nombro da lamaoj, kiuj faras budhismajn aktivadojn ĉiutage kaj studas sutrojn. La administrantaro el lamaoj efektivigas demokratian administradon. Post budhismaj aktivadoj iuj lamaoj faras terkulturajn kaj aliajn laborojn kaj kompreneble ili havas sufiĉe da donacoj. La lamaoj, kiuj perdis labor-kapablon, estas vivtenataj de la ŝtato.

Nun la lamaoj en tibetaj temploj plejparte estas grandaĝaj, pro tio la administrantaro de ĉiu templo alte taksas kulturadon de junaj lamaoj. En 1983 naskiĝis la Tibeta Budhisma Seminario destinita por kulturi altrangajn bonzojn. Kaj prosperas la tibeta budhismo en la tuta aŭtonoma regiono. ■





Lamaoj en religia rito

Foto de Du Zequan



- 1. Piaj budhistoj
Foto de Du Zequan
- 2. Religia aktivado
Foto de Du Zequan
- 3. Preĝo Foto de Du Zequan
- 4. Tashilhunpo-templo
Foto de Li Qiang
- 5. En budho-sunuma festo
Foto de Li Qiang

1	4
2	5
3	



CHEN BAOLONG KAJ LIAJ KALABASAJ SKULPTAĴOJ

Fotoj de LIU SIGONG

Vilaĝa instruisto Chen Baolong amas belarton ekde sia infaneco. Kiam li lernis en mezlernejo, li jam interesiĝis pri kalabaso. Li skulptis el kalabaso groteskan cerveton kaj estis laŭdata de la belarta instruisto. Kaj tiam li komencis kalabasan skulptadon.

Li faris skulptaĵojn el naturaj kalabaso. Li unue prilaboris la kalabasojn, poste faris kunmetaĵojn per gluo, zorgeme ilin ĉizis kaj desegnis kaj fine elfaris originalajn artaĵojn en antikva stilo, kiaj incensujo, florzazo, vinujo, pavilono, kiosko, budhostatuo, birdo kaj besto. Liaj skulptaĵoj estas versimilaj.

En 1994 Chen Baolong akiris de Unesko honoran diplomon de ĉina popola metiartisto. Liaj kalabasaj skulptaĵoj eksponiĝis en Japanio kaj Usono kaj estis alte taksataj de la rigardantoj.



S-ro Chen Baolong en prilaborado de kalabaso



Birdoj kaj besteto



Bonzo kaj incensuoj



Vinuj

Heliko kaj serpento



Kuraĝa ŝafo

(Rusa fabelo)

de BRONISLAV ĈUPIN (Rusio)

KAPRO kaj ŝafo ekiris al densa arbaro por paŝtiĝi kaj promeni libere. Ili iris, iradis kaj perdis la vojon en la malluma arbaro. Ili eniris la mutan densaĵon kaj vidis, ke apud la arbo lupoj preparas tagmanĝon.



La kapro diris mallaŭte al la ŝafo:

— Kion ni faru, amiko? Kredeble, ni estas pe-reontaj. Teruregaj lupoj formangos nin.

La ŝafo diris pli mallaŭte:

— Ni suprenrampu la arbon! Eble la lupoj ne atingos nin.

La kapro kaj ŝafo suprenrampis la arbon.

Ili rampis, rampis kaj ĝisrampis la pinton de la arbo. La ŝafo falis de la pinto, al kroĉiĝis al branĉo per la kornoj. La branĉo ne eltenis, kaj la ŝafo falis

de la arbo surteren, rekte tien, kie la lupoj preparis tagmanĝon.

La ŝafo ekblekis pro timo!

— Be-e-e!

La lupoj ektimis, faligis la potojn, tretis la fajron kaj disverŝis la kuirajon. Ili diskuris, ne returnante la kapon.

La ŝafo ekstaris, skuigis kaj diris al la kapro:

— Kapro, malsupreniĝu de la arbo. La lupoj timas min, mi fuĝigis ilin. Kia kuraĝa mi estas! Be-e-e! ■

La maljuna Polkano

de LARISA KUZMENKO (Rusio)


ANTAŬ kelkaj jaroj mi havis hundon, kies nomo estis Polkano. Mi havis ankaŭ katinon. La katino havis kvin belajn katidojn.

Kiam la katino ne sidis kun siaj idoj, Polkano tuj iris al ili kaj ili ege ĝojis pri sia granda “panjo”, surgrimpis lian dorson, ruliĝadis trans lin, kvazaŭ ili estus globetoj, kaj pepis mallaŭte pro plezuro. Polkano estis kontenta.

Sed se iu petolulo grimpis sur la kapon de Polkano, ĉi tiu gardeme forsvingadis ĝin per sia piedo kaj kontente kuŝadis kun duonfermitaj okuloj.


Sed malfeliĉo okazis ĉiam, se li trovis la katinon kun siaj idoj — ŝi tuj nazbruis, snuf-snufis terure! Tiam la maljuna Polkano foriris timeme, kuŝadis sur la malnova apogseĝo, metis sian kapon sur la piedojn kaj rigardis al mi per siaj ege malĝojaj okuloj.

Polkano multe enuis sola sen infanoj. Sed la katino volis kun neniuj dividi sian ĝojon. ■



Changbai-montaro

de ZHAO XI



Changbai-montaro, unu el la famaj ĉinaj montaroj, kuŝas en la orienta parto de la provincoj Liaoning, Jilin kaj Heilongjiang. Sur ĝia supro estas vulkana lago Tianchi, la plej alta en Ĉinio. Ĉirkaŭ la lago staras 16 montpintoj pli ol 2 500 m super la marnivelo. La montaro estas tutjare vualita de blanka nubaro kaj pro tio ricevis la nomon Changbai, kiu signifas "ĉiam blanda" en la ĉina lingvo.

Tie la klimato estas favora por la prosperaj praarbaroj kaj prezentiĝas kvar vertikalaj flaŭroj de mezvarma ĝis malvarma zono: pingla- kaj larĝa-foliaj arbaroj, pingla-foliaj arbaroj, betularoj kaj altmonta musko. Tie oni povas ĝui belajn pejzaĝojn en la kvar sezonoj.

Changbai-montaro abundas je riĉfontoj. Estas jam konitaj 46 erco-specoj. Tie 76% de la montaro estas forstumitaj. Oni ne hakas arbojn senbride, sed faras plantadon tuj post hakado. Oni laŭplane ekspluatas minojn. Samtempe kun la ekonomia disvolviĝo oni efike protektas la naturan aspekton de Changbai-montaro. La akvo de Tianchi-lago malsupren fluas tutjare. Oni utiligas ĝin por produkti elektron, irigacii kampojn kaj fari mineralan akvon. La termofontoj ĉe la montpiedo kun diversaj mineraloj povas kuraci haŭtajn malsanojn kaj forigi doloron en lumboj kaj kruroj.

En la bela kaj riĉa Changbai-montaro vivas raraj sovaĝaj bestoj de 250 specioj, kiaj nordorient-ĉinia tigro, makulcervo kaj bruna urso. Laŭ iliaj vivkutimoj oni adoptis diversajn rimedojn por pro-


tekti ilin, ebligante ilian multiĝon. En 1980 UN enlistigis Changbai-montaron en la protektendan internacian biosferon. En 1994 la ĉina registaro sankciis ĝin kiel ŝtatnivelan arbaran turisman lokon.



Turistoj en piedbano

Foto de Zhao Xi

En la supro de la montaro
Foto de Feng Jin



Tianchi-lago

Foto de Xiao Ming



Betuloj kaj aceroj en la montaro





Foto de Xiao Ming




La Tigra Dorso de Changbai-
montano Foto de Xiao Ming



Aloufalo

Foto de Zhao XP



En primavera

Foto de Jiang Yunlong



Subakva roboto

WEI WEN:

Ĉinaj superhomoj

ANTAŬE oni vidis superhomon nur en filmoj kaj miris pri lia ĉiopoveco. Kompreneble oni klare scias, ke fakte tiu superhomo estas adorato imagita de la homoj mem. Nun vere aperis superhomoj, kiuj naĝas en maro profunda je 6 000 metroj, lerte piedas sur vertikala muro, laboras en danĝero de nuklea radiado, eksplodo, enfalado kaj neniom difektiĝis... Kio efektive ili estas? Ili estas inteligentaj robotoj faritaj de ĉinaj sciencistoj.

Por montri iliajn magiajn povojn, ni prenu subakvan roboton kiel ekzemplon: En la loko profunda je 6 000 m sub la marsurfaco regas 600 atmosferoj, kiuj kaŭzas dispremitecon al la ujo el ŝtala plato dika je 2-3 milimetroj. Tial la "haŭto" de la robotoj devas esti farita el premrezistaj materialoj. En marprofundo elektromagnetaj ondoj ne estas riceveblaj, tial la robotoj devas aŭtomate solvi ĉiujn problemojn. Ekz., la akustika lokaliz-sistemo en ilia cerbo povas doni 8 instrukciojn por determini


vojon, eviti ĉiujn malhelpaĵojn. Krome, kiam okazas ia ajn perturbo aŭ perdiĝas ilia povo de movo, la memrega programo povas konduki ilin al marsurfaco, aŭtomate malŝarginte ilin, stariginte radian antenon kaj lumiginte lampon por peti urĝan helpon. Pere de la menciita sistemo kun sintezaj teknikoj en la profunda maro la robotoj povas moviĝi laŭ difinita linio, fari surbendigon, fotadon kaj submaran esploron kaj aŭtomate noti akiritajn datenojn kaj koncernajn koordinatojn. En la mondo 97% de la maroj estas profundaj je malpli ol 6 000 metroj, tial ni kredas, ke la supre menciitaj subakvaj robotoj sufiĉe taŭgas por ekzameno pri marfundaj riĉfontoj, mara scienc-esploro, elakvigado ktp.

Nuntempe estas multaj danĝeraj kaj poluciaj laboroj en nuklea industrio, kemiindustrio, min-ekspluato, publika sekureco kaj fervoja konstruado, kiujn malfacile plenumas homoj. Feliĉe, ilin povas plenumi la robotoj telemekanike movataj, surmure piedantaj

aŭ danĝer-forigaj. La novtipaj robotoj, kun komputera monitoro kaj speciala strukturo, taŭgaj por supren- kaj malsupren-irado sur ŝtuparo, povas plenumi komplikajn laborojn.

La inteligentaj robotoj montras sin kapablaj en aŭtomata produktado. En elektroventumila fabriko de Guangdong-provinco, sur 21-metra produktolinio, 5 muntrobotoj samtempe instalas 3 normajn generatorojn por elektroventumiloj. Ili ne nur altigis la mekanikecon de la laboro, malpliigis la streĉitecon de laboristoj, sed ankaŭ garantiis kvaliton de la produktaĵoj.

La supre menciitaj robotoj estas plej novaj sciencaj fruktoj en Ĉinio. En tiu sfero la ĉinaj scienc-teknikistoj aplikis ne nur la avantgardajn teknikojn de aliaj landoj, sed ankaŭ tiujn nove inventitajn de ĉinoj mem, kaj krome ili malmultigis la produktokoston de la robotoj. ■



Ĉe Qilian-montaro

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

MALRAPIDE degelis neĝo sur Qilian-montaro. La akvo fluis malsupren. Ĉie verdiĝis herbejoj, flavis kolz-floroj... Dum jarmiloj Qilian-montaro nutris la Silkan Vojon per sia akvo. En la antikveco, kiam oni sentis fortan soifon, trapasante la vastegan Gobi, ili tre facile trovis vivoplenan oazon kaj sur ĝi restis iliaj misteraj spuroj, kortuŝaj legendoj, riĉaj produktaĵoj kaj nacioj kun apartaj moroj.

GRANDA BUDHO-STATUO EN ZHANGYE

La urbo Zhangye, en la meza parto de la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero, ĉiam ĝuas la nomon loko abunda je fiŝoj kaj greno sur la altebenaĵo. Ĝi estis ne nur grava staplejo por komercistoj sur la Silka Vojo, sed ankaŭ grava budhisma loko. Menciante la urbon, oni antaŭ ĉio rememoras la argilan budho-statuon 35 m longan kaj 7.5 m larĝan. Ĝi estas la plej granda el la kuŝantaj budho-statuo en Ĉinio. La budho-statuo kviete kuŝas en antikva templo kun delikate fermitaj okuloj.

La templo konstruiĝis en 1098. Legendo diras, ke siatempe iu nobla bonzo faris meditado tie kaj subite aŭdis sonon sub la planko. Li faris foson kaj trovis antikvan statuon de kuŝanta budho inter flavaj brikoj kaj verdaj tegoloj. Pro tio la bonzo decidis konstrui la Templon de Kuŝanta Budho-statuo... Post pli ol 100


jaroj iu mongola virino pia je budhismo tranoktis en la templo kaj naskis bebon, kiu poste fariĝis la unua imperiestro Kublajo (1215-1294) de Yuan-dinastio (1271-1368).

Kiam Kublajo regis Ĉinion, la Silka Vojo estis movoplena. La giganta budho-statuo de Zhangye altiris al si multajn vojaĝantojn, inter kiuj estis fama itala vojaĝisto Marco Polo. En liaj vojaĝnotoj legiĝas: "En Zhangye arbare staras temploj kun budho-statuo ene... La plej granda el ili estas kuŝanta budho-statuo longa je dekoj da paŝoj. Ĉirkaŭ la budho-statuo staras multaj malgrandaj budho-statuo ĝin salutantaj."

En la aĝo de 17 jaroj Marco Polo ekveturis orienten kune kun siaj patro kaj onklo kaj venis al Ĉinio post tri jaroj. Li rapide ellernis la ĉinan kaj mongolan

lingvojn. Kublajo-Hano ŝatis tiun saĝan junan italon kaj komisiis al li gravajn taskojn. Marco Polo faris inspektion aliloke de Ĉinio. Li oficvojaĝis preskaŭ al ĉiuj famaj urboj de Ĉinio kaj iafoje funkciis kiel sendito de Ĉinio en aliaj landoj. Post 17 jaroj li revenis Italion kaj konigis sian vojaĝon al iu verkisto, kiu komponis "Vojaĝo de Marco Polo". Kaj multaj eŭropanoj sciigis pri pres-arto, kompas, pulvo kaj bruligeblaj "nigraj ŝtonoj" sub la tero de Ĉinio. Poste iuj geografoj faris mapon laŭ priskribo en la libro. Itala navigisto Kolumbo, leginte la verkon, volis malkovri maran naviglinion al la Oriento. En 1492 li komencis sian ekspediciadon, komandante ŝiparon kaj kunportante leteron de la hispana reĝo al la ĉina imperiestro, kaj fine li malkovris la novan kontinenton

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







1. La jugura fortostreĉa ludo
2. Antaŭ edziniĝo de jugura knabino
3. Novedzino vualita por fari viziton
4. Novgeedzoj proponas vinon al la gastoj.
5. Vintrinkado antaŭ ol viziti geedziĝan ĉamburon

1	2	3
4	5	



Ameriko.


JIUQUAN, VINO KAJ JADA POKALO

Nia aŭto forlasis la urbon Zhangye, veturis okcidenten ses horojn sur Gobio kaj eniris la antikvan urbon Jiuquan (Ĝi-ŭĉjūan).

Jiuquan estis unu el la kvar prefektujoj en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero. Legendo diras, ke antaŭ 2 000 jaroj, en Han-dinastio generalo Huo Qubing, komandante pli ol 10 000 rajdistojn, atakis la hunojn kaj akiris grandan venkon. La ĉina imperiestro Wudi estis tre ĝoja kaj donacis al Huo urnon da vino. Tamen la brava generalo Huo ne volis drinki sola kaj verŝis la vinon en fonton, por ke la tuta armeo kune ĝuu ĝin. Jen pro tio la urbo ricevis sian nomon (en la ĉina lingvo Jiuquan signifas vinan fonton).

La fama fonto kuŝas oriente de la urbo je 0.5 km. Kvankam la klara fonto ne odoras vine, tamen tie estas forta bonodoro, ĉar sur la fonto flosas multege da palflavaj oleastraj floroj... Antikvaj libroj notas, ke tiu ĉi fonto ne glaciĝas, sur ĝi ĉiam estas densa nebulo kaj la akvo estas dolĉa kaj ideala por fari vinon.

Cervoj bredataj ĉe la piedo de Qilian-montaro



Vino akompanis la komandantojn kaj batalantojn en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero ne nur en la celebraj tagoj por la venko, sed ankaŭ en la ordinaraj tagoj. Ili, drinkante, ludis bivon en la kazino. Jen batala korno eksonis kaj la drinko ludis rolon por soleni la komencan de ekspediciado. Drinkinte, ili do komencis la militmarŝon en alta batalspirito, defiantaj la morton. Tia militista vivo speguliĝis ankaŭ en poemo de Tang-dinastio (618-907). En tiu poemo la unua verso estas "Vinbera vino, jadpokalo".

Ĉinoj komencis fari alkoholaĵon antaŭ 5 000 jaroj, tamen ne el vinberoj, sed el greno. Vinberoj origine kreskis en Eŭropo. En helenaj legendoj la dio de vino estis ankaŭ protektanto de vinberkulturantoj. El tio ni scias, ke okcidentanoj faris alkoholaĵon el vinberoj en la komenco. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj Zhang Qian, sendito de ĉina imperiestro, kunportis en Ĉinion vinberojn post sia vojaĝo al okcident-aziaj landoj. Imperiestro Wudi rigardis tiun frukton kiel kuriozaĵon kaj ordonis planti vinberujojn en la imperiestra ĝardeno kaj sur fekundaj kampoj. Kaj en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero aperis vinberĝardenoj. La

alkoholaĵo el vinbersuko estas dolĉa, bongusta. Oni lernis fari ĝin en la regno Dayuan, kie aktivadis ĉielaj ĉevaloj. Historiaj libroj notas, ke la loĝantoj de Dayuan, drinkemaj, estis lertaj en farado de vino, kaj tie multaj riĉaj familioj havis dekmilon da urnoj da vino, kiu bonodoris eĉ post dekoj da jaroj.

La jada pokalo, bone konata pro la fama poemo de Tang-dinastio, estas farita el jado en Qilian-montaro. Tiaj pokaloj plejparte estas bluverdaj. Kun vino ene ili brilas sub la luno. Oni diras, ke la antikvaj ĉinoj preferis preni bongustajn manĝaĵojn per luksaj manĝiloj. Bona vino en luksa pokalo faras la plej bonan medion por drinkado. La jado produktita en Qilian-montaro, delikata kaj diafana, estas taŭga por fari pokalojn.

GAJA VALO

En la granda Tigra Valo de Qilian-montaro estis kviete, aŭdiĝis nur lirlado kaj birda kanto. Ne troviĝis vojoj kaj ĉie kreskis antikvaj arboj. La vepro kvaŭzaŭ giganta erinaco kaŭris sub maljunaj arboj. Sur la pendantaj pontoj super la rivereto ripozis grizaj kolomboj. Sur la herbejo belaj fazanoj instruis siajn idojn kapti insektojn... Je la momento nia aŭto estis haltigita de aro da gruntbovoj. La bestoj kuŝis sur la tero. Malgraŭ ke la ŝoforo kornis foje refoje, ili neniom moviĝis. Tio daŭris plurajn minutojn. Fine la plej forta gruntbovo stariĝis, mallevis sian kapon, per sia korno ektuŝis la tegmenton de nia aŭto kaj malrapide foriris, gvidante siajn kunulojn.

Tie vivas ankaŭ cervoj kun blankaj gluteoj, dorlotataj de la tieaj juguroj. Vidinte nin, la cervoj tuj ĉirkaŭis nin. Sed post nelonge ili foriris eble kun bedaŭro, ke ni ne kunportis al ili manĝaĵojn.

Qilian-montaro estas paradizo de sovaĝaj bestoj. Tie vivas sova-




Tambura turo en Jiuquan

Jadaj pokaloj




Ŝtonskulptitaj pagodoj en Matisi-templo






Kuŝanta budho-statuo



Ligna pagodo en Zhangye



Bela gravuraĵo sur la fronta muro de la templo

ĝaj bestoj de proks. 60 specoj, tamen la cervoj kun blankaj gluteoj estas bredataj. Ĉiujare, fine de junio, venas reprodukta sezono de sovaĝaj cervoj. Juguraj paŝtistoj iafoje vidas forlasitan cervidon, portas ĝin hejmen kaj nutras ĝin per lakto de gruntbovo. La cervidoj akompanas paŝtiston kaj ne volas forlasi la mastron eĉ post sia plenkreskado. Paŝtisto diris al mi, ke por ke la cervidoj ne estu izolitaj, oni iam lasas aliajn cervidojn ilin akompani.

Kun la kornoj la vircervoj aspektas tre bele. Kun alte levita kapo, ili staras sur montodeklivo kaj majeste rigardas ĉirkaŭen. Kiam ili iras tra arbaro, ili atente tenas la kornojn sur sia dorso, por ke la branĉoj ne vundu ilin. Atakate, ili preferas rompi siajn kornojn ol ke la malamikoj ilin akiru.

Kiam la cervinoj atingas sian adoleskantecon, sovaĝaj cervoj iras al ili por pariĝo, sed ili iras for post nelonge, ĉar ili alkitimigas al distrema vivo.

JUGUROJ

Mi kaj mia akompananto iris en la tendon de paŝtisto An Liming, kiam tiu faris feran fornon. La fumtubo kondukas al terlito 0.3 m alta. Oni ne malkonstruas la terliton, kiam ili migras aliloken. An kaj liaj familianoj revenis hejmen antaŭ nelonge de la vintropaŝtejo. Li diris al mi, ke nun la migrado estas tre facila, ĉar oni povas transporti grenon kaj tendon per aŭto. Sed li devas konduki siajn 200 ŝafojn por tio dum du tagoj.

La tendo estas farita de An mem. En libera tempo li faris ŝnuron kaj teksis ŝtofon el gruntbovaj haroj kaj fine el ĝi preparis tendon. Por fari ĝin estis bezonataj tri jaroj. Tia tendo estas taŭga por tralasi aeron, tial en somero en ĝi ne estas sufoke, kaj en pluva tago la ŝtofo kuntiriĝas kaj fariĝas likimuna.

Tiam revenis la edzino de An.

Ŝi surdorse portis sekan bovfekaĵon kolektitan sur la monto kaj ŝutis ĝin en kavon. Proksime de ĝi estis alia terkavo, kie kuŝis ŝafhundo. Ŝi diris al mi, ke ŝi volas fosi alian kavon, por ke la kokinoj demetu ovon en ĝi.

Revenis hejmen ankaŭ la filo de An. Tiu 21-jara junulo paŝtis motorcikle. Tiam li volis munti vento-energian generatoron por lumigo kaj televidado. Lia fratino preparis buter-teon en fera pototo sur tri ŝtonoj por regali nin.

“Maljuna An, ĉu vi ne volas esti laboristo kaj loĝi en etaĝdomo?” mi demandis.

“Mi preferas vivi nomadan vivon,” li respondis.

“Kaj vi, juna An?” mi turnis min al lia filo.

“Mi volas, sed ne havas tian ŝancon. Kompreneble, mi ŝatas ankaŭ paŝtadon, ĉar tio estas heredita de miaj prapatroj.”

La prapatroj de la juguroj kultis la ĉielan dion. En la unua monato de ĉiu jaro laŭ lunkalendaro kaj post la komenciĝo de aŭtuno ili invitis sorĉiston buĉi bruton kaj kultu la dion, ĉar ili opiniis, ke tio estas utila al favora klimato por paŝtado kaj sekureco de la homoj kaj brutoj. La emblemo de la ĉiela dio estas maldika ŝnuro el gruntbovaj haroj kun diversaj kvastoj kaj koloraj tolrubandoj kaj pendanta tolsako plena de diversaj cerealoj. La sorĉistoj havis ĉe la okcipito maldikan harligon ĉirkaŭvolvitan per kolora rubando. Nun oni ne plu kultas la dion, tamen multaj maljunuloj daŭre petas konsilon de sorĉistoj, perdinte ŝafon aŭ renkontinte aliajn malfacilaĵojn.

La jugura etno havas historion de jarmiloj, tamen ĝi ne havis skriban lingvon. La juguroj memoris aferon per nodado de ŝnuro kaj nombris per faboj, sed nun la juguroj havas siajn profesorojn kaj fakulojn. La juna generacio ne volas daŭrigi la antikvan vivmanieron. En la gubernia urbo


ni vizitis iun novgeedzan hejmon. Kvankam la bopatrino preparis belajn kap-ornamaĵojn kaj veston por la novedzino laŭ la etna regulo, tamen la juna paro portis eŭropstilan veston kaj blank-gazan robon respektive kaj faris memorigan foton.

La juguroj estas nomada etno, kiu plurfoje migris laŭ la Silka Vojo kaj kunfandiĝis kun aliaj etnoj. La jugura etno nun nombras nur 12 000 membrojn, kiuj plejparte vivas ĉe Qilian-montaro.

Antaŭ 10 jaroj du hungaraj antropologoj-folkloristoj venis al la suda Gansu-provinco kaj faris tie esploradon. Ili hazarde renkontis iun juguron kun alta nazalo kaj profundaj okulkavoj, fiksas la rigardon al li kaj kun miro diris: “Se vi estus en Hungario, neniu kredus, ke vi estas ĉino.” Vere, juguroj havas multon similan al tiu de hungaroj. La prapatroj de ambaŭ flankoj kredis je *saman*-religio, faris aŭguradon per ŝafosto kaj kultis la ĉielan dion. Ili kantis popolkantojn kun similaj melodioj kaj tekstoj. En multaj popolrakontoj kun similaj intrigoj estas diablo malutila al la popolo. La du supre menciitaj fakuloj kredis, ke ili havas ŝangrilaton kun la juguroj.

Tamen la evoluo de la ŝangrilato ne estas klara. Legendo diras, ke la prapatroj de la hungaroj, kiuj vivas ĉe Danubo, iam nomadis en la Oriento. Legendo diras ankaŭ, ke la juguroj havis plurajn branĉojn. Iu el ili migris okcidenten, dum aliaj fiksloĝiĝis ĉe Qilian-montaro. En iu distrikto de Yongchang-gubernio, en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero, vivas multaj homoj kun bluaj okuloj kaj blondaj haroj. Oni supozis, ke iliaj prapatroj estis membroj de roman-ia ekspedicio, kies plejparto malaperis en Gobio. Nur kelkaj el ili atingis la regionon okcidente de la Flava Rivero. Ili edz(in)iĝis al lokanoj kaj iliaj posteuloj fariĝis mikssanguloj. ■

Kie aperis la unua birdo?



En prifosejo

ESTAS ankoraŭ multaj gravaj problemoj solvendaj nuntempe en la historio de vivevoluo kaj unu el ili estas origino de la birdoj kaj ties fruperioda evoluo. Ĉu la birdoj devenis de malgrandaj dinosaŭroj? Kiamaniere ili ekflugis en la aeron? Pri tio paleontologoj prezentis diversajn hipotezojn surbaze de la konataj materialoj. Tamen, ni ankoraŭ ne venis al certaj konkludoj.

ĈU ARKEOPTERIGO ESTAS LA PLEJ PRIMITIVA BIRDO?

En 1861, en Bavario de Germanio estis malkovritaj sep fosilioj de arkeopterigoj vivantaj en mezozoiko. La arkeopterigoj, kun parte saŭraj trajtoj kaj parte birdaj trajtoj, estis rigardataj de la mondaj paleontologoj kiel la prapatro de la modernaj birdoj. Ili esploris la devenon kaj ekflugon de la birdoj laŭ la specimenoj.

En aŭgusto kaj septembro 1996 ĉinaj ornitologoj anoncis, ke ili malkovris ion pri deveno de la birdoj. Usonaj, germanaj kaj japanaj gazetoj publikigis tion. Junie de 1996, okazis en Usono la Kvara Internacia Konferenco pri Birdaj Paleontologio kaj Evoluo. La partoprenantoj varme diskutis pri fosilioj de praaj birdoj de Ĉinio. Iuj opiniis, ke la malkovro de Ĉinio eble kaŭzos konteston pri deveno de la birdoj en la paleontologia rondo de la mondo.

KONFUCEA BIRDO, SIMBOLO DE BIRDA EVOLUO

En 1994 estis malkovrita la unua fosilio de praa birdo en la subprovinco Chaoyang, Liaoning-provinco, Ĉinio. Transpreninte ĝin el la mano de kamparano, prof. Hou Lianhai, kiu laboras en la Instituto de Vertebra Paleontologio kaj Paleoantropologio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, ekzaltiĝis de ĝojo. Post reordigo de ĝi li trovis, ke ĝi vidigus la evoluon de la birdoj. Nelonge poste, oni donis al ĝi la nomon konfucea birdo.


Prof. Hou Lianhai bazis sian juĝon sur la fakto, ke konfucea birdo similas al arkeopterigo per primitiveco de la krania strukturo, neunuigo de la karpeoj kaj metakarpoj de la antaŭaj membroj, forteco de fingrakaj ung-ostoj kaj havo de la kvina metatarso. Post plua esplorado li kon-

statis, ke konfucea birdo havas trajtojn, kiuj mankas al arkeopterigo.

Unu el la gravaj diferencoj inter ili kuŝas en la beko. Arkeopterigo havas dentojn, dum konfucea birdo ne; la lasta havas kornecan bekon, sed la antaŭa ne. Alia grava diferenco estas, ke konfucea birdo havas truon kun diametro de malpli ol unu centimetro meze de la humero, proksima al la korpo, de ĉiu antaŭa membro, sed arkeopterigo ne havas ĝin. La tria grava diferenco konsistas en tio, ke la dua fingro de ĉiu antaŭa membro de konfucea birdo estas evidente malpli granda ol tiu de arkeopterigo. Kaj plie, konfucea birdo havas voston vertebraron malpli longan kaj sternumon pli fortan ol arkeopterigo.

Analizinte ĉiujn diferencojn, prof. Hou Lianhai konkludis, ke ili montris nenion alian ol flugpovon, propran al konfucea birdo.

Surbaze de flugpovo posedata de la birdo, ĉinaj ornitologoj opinias, ke konfucea birdo apartenas al specio de la birdoj kaj arkeopterigo al subspecio de la birdoj. Iuj ornitologoj portas tute malsaman opinion pri evoluo de la konfucea birdo. Laŭ ili, arkeopterigo estas relative primitiva, tamen ĝi posedas glitumpovon aŭ sufiĉe malgrandan flugpovon. Kaj konfucea birdo, vario inter arkeopterigo kaj aŭten-



La fosilio de ĉina saŭrobirdo



La fosilio de konfucea birdo

tika birdo, estas primitiva birdo posedanta ian kapablon flugi.

ĈINA SAŬROBIRDO, VARIO DE DINOSAŬRO AL BIRDO

Ĉu sur nia planedo iam ekzistis birdo, pli primitiva ol arkeopterigo? La respondo devas esti jesa, kiel opinias prof. s-ro Ji Qiang (Ĝji Ĉjang), kuratoro de la Ĉina Geologia Muzeo. Juĝate laŭ multaj trajtoj de arkeopterigo, ĝi ne estas plej primitiva birdo. Povus esti, ke antaŭ ĝia apero vivis birdo, neflugipova, pli primitiva kun longa vosto, akraj dentoj kaj origina plumaro.

Malpli ol unu monaton post kiam la ĉinaj ornitologoj faris la anoncon pri la konfucea birdo, s-ro Ji Qiang publikigis, ke la Ĉina Geologia Muzeo antaŭ nelonge akiris novan fosilion de birdo. Oni konstatis post analizo, ke ĝi probable estus la aŭtentika prapatro de la birdoj kaj ricevis la nomon primitiva ĉina saŭrobirdo.

S-ro Ji Qiang faris postdoktoriĝan studadon pri paleontologio en Germanio. La de li gvidata Grupo por Esplori Biosferon kaj Stratuman Kronologion de Okcidenta Liaoning en Mezozoiko trovis, ke la kontinenta stratomo de la loko, kie estas malkovrita la fosilio de la konfucea birdo, dikas pli ol 1 000 m. Tie plurfoje okazis vulkana erupcio antaŭ kretaceo. Verŝajne, sub la stratomo kun fosilio de la konfucea birdo kaŝiĝas tiu de la prapatro de aŭtentikaj birdoj.

Meze de aŭgusto 1996 la nova fosilio de birdo estis malkovrita ankaŭ en la subprovinco Chaoyang.

S-ro Ji Qiang prezentis trajtojn, per kiuj li konstatis, ke la birdo estas la plej frua en la mondo: Ĝi vivis antaŭ 140 milionoj da jaroj kaj havis rudimentajn trajtojn koncerne la formon de birdo. Ĝi surhavis plumaron pli mallongan ol konfucea birdo kaj arkeopterigo, kun dentoj krudaj kaj akraj kaj 52 vostajn vertebroj. Laŭ takso ĝi aperis 20-30 milionojn da jaroj pli frue ol arkeopterigo kun pli ol 30 vostaj vertebroj kaj konfucea birdo kun des pli mallonga vosta vertebraro. Tiu birdo havis mallongajn antaŭajn membrojn kun mallongaj plumoj. Tamen ĝi ne kapablis flugi. Ĝi kuris per la malantaŭaj membroj, kiel struto. En evoluo de birdoj plumaro fariĝis pli kaj pli densa kaj dentoj malaperis iom post iom. Pro degenero konfucea birdo jam perdis siajn dentojn. En evoluo de pterosaŭro al moderna birdo la vosta vertebraro pli kaj pli mallongiĝis kaj fine fariĝis vostplato.

S-ro Ji Qiang geologie analizis la evoluon de ĉina saŭrobirdo. En la historio en okcidenta Liaoning-provinco kuŝis vasta lago taŭga por la vivo de la birdoj. Sekve la loko plejble estis la lulilo de la birdoj. En ĝi estas trovitaj fosilioj de 16 specoj de bestoj, inkl. de dinosaŭroj, fiŝoj kaj birdoj. El granda kvanto da fosilioj 200 estas tiuj de konfuceaj birdoj. Ni deziras, ke en tiu ĉi stratomo estu trovitaj pli multaj fosilioj de birdoj. ■

CHEN JIN:

Vilaĝa instruisto Wang Haoren



Instruisto Wang Haoren kaj liaj lernantoj

LI aspektas kiel kamparano: bruna haŭto, kru-
daj manoj, malmodaj uniformo kaj kaŭĉukaj
ŝuoj.

Li nomiĝas Wang Haoren, naskita kaj kreskinta sur la Leŭsa Altebenaĵo, efektive estas kamparano. En somero kaj aŭtuno, ŝvitante li rikoltas tritikon kaj maizon. Tamen tuj post laborplena sezono li donas lecionojn same kiel multaj aliaj vilaĝaj instruistoj. En ĉinaj vilaĝoj estas speciala sistemo de kamparanoj-instruistoj. Malriĉaj vilaĝaj infanoj ne povas pagi por lernado. Por ŝanĝi la situacion, ekde la 50-aj jaroj lokaj registaroj energie disvolvas edukadon en vilaĝoj. Ĉar mankas instruistoj, iuj klerigitaj kamparanoj estas elektitaj kiel instruistoj. Ili havas propran kampon por kultivi grenon kaj legomojn kaj tial ne ricevas salajron de la ŝtato. Jam en la 60-aj jaroj Wang Haoren, diplomito de mezlernejo, fariĝis tia instruisto. Kvankam li povis trovi okupon en urbo, tamen li restis en la malriĉa hejmloko, por ke ĝiaj infanoj ne estu analfabetoj.

La kondiĉoj de vilaĝaj lernejoj estas malbonaj. Kompare kun urbaj instruistoj, vilaĝaj instruistoj zorgas pli multe. La elementa lernejo de Linping-vilaĝo, Yongdeng-gubernio, Gansu-provinco, kie Wang Haoren laboras, estis en kaduka templo. Post longa tempo tiuj klasĉambroj difektiĝis. Wang Haoren ofte pensis, ke estos bone, se la geknaboj lernos en grandaj lumaj ĉambroj. En someraj ferioj iujare, anstataŭ reveni hejmen, li restis en la lernejo por ripari la klasĉambrojn kune kun masonistoj. Por ŝpari monon, li iris kun simpla manĝaĵo al la urbo por aĉeti bonkvalitan lignon kaj tranoktis en humida lignejo. Laŭ la spirito mastrumi la lernejan aferon en modesta maniero, li okupiĝis pri instruado. Kiam difektiĝis tabloj kaj seĝoj, li mem riparis ilin. Li rigardas la lernejon kiel sian hejmon, eĉ pli gravan ol ĝi.

En 1991 Ĉinio ellaboris Projekton "Espero", kiu celas monhelpi malriĉajn lernantojn. La loka registaro kaj diversaj oficejoj kolektis centmilojn da ju-

anoj por konstrui elementan lernejon "Espero" en Linping-vilaĝo. Informiĝinte, Wang Haoren tre ĝojis. Post interkonsiliĝo kun sia edzino li donacis al la lernejo 1 000 juanojn, kiujn ili ŝparis por konstrui loĝdomon.

Al siaj lernantoj li donas simplan amon kiel patro. Li ofte diras, ke ju pli multe da amo oni donas al geknaboj, des pli multe da esperoj oni havos en la estonteco. Li paciencie instruas al novaj lernantoj skribadon, helpas ilin akriĝi kraĵonon kaj eĉ atentigas ilin pri necesejo. En vintro Wang Haoren ofte iras al la lernejo frue por hejti fornon. Iu knabo, kies gepatroj eksedziĝis, perdis la familian amon. Wang Haoren loĝigis lin en sia hejmo. Dank' al li, la geknaboj de la montaro havigis al si memfidon. Kuraĝigite de li, iu lernanto, kiu suferis de poliomiĵelito, streĉis plene la energion por partopreni fizikkulturan lecionon, grimpi monton kaj ne lasi dorse porti sin al la lernejo en pluva tago. Iu knabino, kiu ĉesigis lernadon pro manko de mono, revenis al la lernejo dank' al lia monhelpo kaj fariĝis elstara lernantino.

Wang Haoren instruis jam 35 jarojn. En 1991 lernantoj multiĝis, du grupoj de la unua klaso unuiĝis pro manko de klasĉambro. Wang Haoren memvole eklaboris kiel ilia ĉefinstruisto kaj ankaŭ instruis la sesan klason. Li gajnis la unuan lokon en la subdistrikto per sia eminenta instruado.

Nun tempiaj haroj de Wang Haoren jam griziĝis, tamen li estas ĝoja, ĉar iuj el liaj lernantoj eniris en universitaton kaj aliaj fariĝis spertuloj de scienca terkultivado, ne sekvante la sorton de siaj gepatroj. Sekve de la disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj edukado, la eduka departemento turnas pli da atento al la vilaĝaj instruistoj, kiuj senlace laboras por kontribui al la vilaĝa edukado. Nun ili ne nur havas ŝancon por plu studi, sed ankaŭ ricevas pli multe da subvencio de la ŝtato. En iuj kompare riĉaj lokoj la vilaĝaj instruistoj ĝuas emeritecon kaj kuracan assekuron. Malgraŭ tio, Wang Haoren senbadaŭre kaj daŭre laboras kiel vilaĝa instruisto. ■

GUANGDONG: RENKONTE AL TIU TAGO

FINE de la pasinta jaro mi intervjuis en Guangdong, suda provinco de Ĉinio, kun la temo “Kion la Guangdong-anoj faras, antaŭ ol Hongkong revenos al la patrolando en la 1-a de julio 1997?”.

La reveno de Hongkong estas grava afero por la tuta Ĉinio. Kial ni mencias aparte Guangdong? Ĉu estas specialaj rilatoj inter ili? Dum vizitado en Guangdong mi rimarkis, krom patriotismo, ĉiun havas ĉiuj ĉinoj, ankaŭ ion pli rektan kaj praktikan: multaj familioj, disigitaj en du lokojn, deziras kunigi; la ekonomio de Guangdong kaj Hongkong devas evolui plu. Eble tio karakterizas Guangdong.

NEDISIGEBLA EKONOMIO

Ni povas kompreni la esperon de la Guangdong-anoj.

Inter Guangdong kaj Hongkong estas nur unu rivero. Ekde la 80-aj jaroj en konstruado de Guangdong 80% de la ekstera kapitalo venas de Hongkong aŭ en la nomo de Hongkong, dume 70-80% de la eksportaĵoj de Guangdong eniras en Hongkong kaj parto pere de ĝi en aliajn landojn. Kiel Guangdong-anoj diris, en ekonomio kaj komerco ambaŭ lokoj dependas unu de la alia.

Nokto de Kantono, ĉefurbo de Guangdong, pli ĉarmas ol ĝia tago. La kvietita Perlo-rivero fluas tra la urbo. Neonlampoj sur domegoj ĉe la rivero speguligas en la akvo kaj prezentas diverskolorajn bildojn. La plej movoplena komerca strato ankoraŭ ne havas signon de kvietigo eĉ en profunda nokto. En interpuŝiganta homfluo mi vizitis unu vendejon post alia, sen pordoklapoj. Inter tiuj vendejoj nemalmul-

taj servas per mondfamaj varoj.

Hongkong, kiu havas 6 milionojn da loĝantoj kaj okupas 1 067 kvadratajn kilometrojn, estas neanstataŭebla centro de financo, komerco kaj navigacio de la mondo. Ankaŭ ĝia industrio estas mondfama. Post la 80-aj jaroj, pro la regionaj kaŭzoj kaj malferma politiko praktikata de la ĉina registaro, Hongkong-anoj translokis al la ĉeftero 90% de siaj industriaj branĉoj, plejparte al Guangdong.

En la urbo Shenzhen, la unua ĉina speciala ekonomia distrikto, troviĝas vico post vico da domoj kaj movoplenaj stratoj. Se mi ne vidus ĝian malnovan foton en muzeo, mi ne povus imagi, ke antaŭ 20 jaroj ĝi estis malgranda fiŝista vilaĝo. La politiko de la distrikto allogis amason da komercistoj el Hongkong. Oni diras, ke varoj, kiaj

aperas en Hongkong matene, jam estas faritaj en Shenzhen posttagmeze. Tial en Shenzhen emergis multaj prilaborejoj, kiuj servas al Hongkong. Hodiaŭ la ekonomio de Shenzhen rapide evoluis kaj aperis amaso da altteknikaj entreprenoj, tamen la Shenzhen-anoj konfesas, ke la tiama kompleksa prilabora industrio profunde influis ilian ekonomion.

Ĉar Hongkong multe investas en Guangdong, Guangdong-anoj esperas, ke Hongkong estos plu prospera kaj stabila post sia reveno al la patrolando.

SANGA RILATO

Kvankam Hongkong kaj la aliaj lokoj de la lando estis apartigitaj por preskaŭ cent jaroj, tamen la profunda sento de la Hongkong-anoj por la patrolando ne povas

Kontenera doko de Yantian-haveno de Shenzhen



esti estingita. Iuj Hongkong-aj komercistoj investas sur la ĉeftero ne sole komerc-cele, sed ankaŭ kun la sento "mi estas ĉino, mi devas fari ion por la patrolando". Fakte, 95% de la loĝantoj de Hongkong estas ĉinoj. En Hongkong kaj Aomen estas pli ol 6 milionoj da loĝantoj, kies plejparto estas Guangdonganoj. En unu familio, aŭ gepatroj, aŭ geedzoj, aŭ gefratoj loĝas dise en Hongkong kaj Guangdong. La rilatoj inter ili similas al tiuj inter lipoj kaj dentoj.

Yantian-haveno de Shenzhen, investita kaj administrata de Hongkong-anoj, estas natura profundakva haveno, nur 3 km for de Hongkong. Ĝiaj instalaĵoj kaj administrado efektive estas mondnivelaj. La leviĝo de Yantian-haveno kaj evoluo de Hongkong-doko kompletigas unu la alian, kio ne nur solidigis la pozicion de konteneroj de la ĉeftero kaj Hongkong en la mondo, sed ankaŭ starigis novan komencon por internaciigi la ĉinan navigacion.

Multaj Hongkong-anoj donacis monon por konstrui lernejon sur la ĉeftero. Zeng Xianzi (Zeng Ŝjanzi), reĝo de kravatoj, ekde la 70-aj jaroj donacis pli ol 300 milionojn da Hongkong-aj dolaroj por konstrui lernejojn. Same kiel li, multaj aliaj famuloj de Hongkong opinias, ke eduko estas tre grava por prosperigi la landon. Ili estas tre entuziasmaj por la eduko de la ĉeftero. En Qingyuan, malriĉa urbo de Guangdong-provinco, mi vidis kelkajn lernejojn konstruitajn per mono donacita de Hongkong-anoj. Unu el ili nomiĝas Novstela Espera Elementa Lernejo. Por konstrui ĝin, iu societo de samlokanoj de Guangdong en Hongkong donacis 400 mil Hongkong-ajn dolarojn. En la lernejo estas griza domo kaj malgranda sportejo. La lernejestro akompanis nin viziti la bibliotekon. En malgranda ĉambro staras grandaj librobretoj, sur la muro estas okulfrapaj fotoj kaj nomlistoj de la mondonacintoj. Rigardante la fotojn, mi sentis emocion. Mi pensis, ke kiam geknaboj lernas tie, ili certe rememoras la mondon-

cintojn de tempo al tempo.

La evoluo de Hongkong estas nedisigebla de la ĉeftero. Sole je trinkakvo, legomoj kaj vivaj fiŝoj kaj kortobirdoj Hongkong multe dependas de Guangdong kaj aliaj provincoj.

En iu frua mateno ni venis al Wenjindu. La pordo de la doganejo ankoraŭ ne malfermiĝis, tamen longa vico da legom-veturiloj atendis sur strato. S-ro Zeng Fanyong, respondeculo de buroo de varokontrolado, diris, ke ĉiutage pasas tien pli ol 300 veturiloj kun legomoj kaj 700 kun vivaj kokoj kaj anasoj. En la kontrolejo ni vidis amasojn da legomoj. S-ro Zeng diris, ke ili kontrolas ĉefe la insekticidon sur ili, la legomoj venas de Shenzhen kaj aliaj lokoj, kaj iuj Hongkong-anoj laŭkontrakte kulturis legomojn en Shenzhen por vendi ilin en Hongkong.

KOMUNA IDEALO

La 1-a de julio proksimiĝas. Urĝo estas aldonita al la ĝojo de la Guangdong-anoj. Ili volas fari grandan donacon al tiu neordinara tago kaj memorajon por si mem. En tiu tago ekfunkcios subtera fervojo kaj okazos la ceremonio de rubandtondo por Humen-ponto super la Perlo-rivero.


Tamen Guangdong-anoj ankaŭ planas igi pli multe da Hongkong-anoj investi en Guangdong, transloki prilaborajn entreprenojn de Hongkong al malriĉaj lokoj de

Guangdong kaj utiligi la superecon de Hongkong por oferti produktaĵojn de Guangdong en la internacia merkato.

Samtempe Guangdong sin preparas por pli bone kunlabori kun Hongkong, ekz. pri konstruado de Lingdingyang-pontego — surmara vojo inter Guangdong kaj Hongkong. Kvankam ĝi estas nur sur papero, tamen la projekto laŭdinda. Sur la skizo legiĝas vortoj: la pontego longas je 23 km kaj larĝas je 31 m, konsistanta el unu 300-metra staja ponto kaj du kablopontoj longaj je 900 m kaj 1 400 m respektive.

La pontego trapasos la urbon Zhuhai de Guangdong, transpasos Lingdingyang-maron kaj atingos Lanjiaozui de Hongkong. Kion ĝi alportos al la popolo? Kiel vojo de ekonomio kaj ligilo de sento, ĝi liveros pli multe da ŝancoj kaj evolu-spacoj. Liang Guangda, urbestro de Zhuhai kaj proponinto de la projekto, diris, ke kvankam estas multaj malfacilaĵoj, tamen ĝi certe sukcesos.

Mi tute kredas, ke tiu Guangdong-ano, kiu gvidis en konstruado de la ĝardeneska urbo Zhuhai kaj landnivela internacia flughaveno, certe povos realigi la revon transpasi Lingdingyang-maron. Hongkong jam akceptis la projekton, kiu estas komuna espero de Guangdong kaj Hongkong. ■



Por esti uzataj en pluva tago

Karikaturo de Li Qing'ai



La aŭtoro (dekstre) kaj lia edzino (la dua de dekstre) gastas en la familio de s-ro Shen Minglun.

WOLFGANG BIENEN (Germanio):

BELEGA VOJAĜO EN ĈINIO

Septembre de 1995 mia edzino Gitta Bienen, mia amiko Helmut kaj mi venis en Pekinon el la urbo Aachen, Germanio. La 4-an de oktobro ni gastis en la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj estis afable akceptitaj de ĝia vicĉefredaktoro Dai Song'en. Dum la ses tagoj de nia restado en Pekino ni vizitis la Grandan Muron, Tian'anmen-placon, la Imperiestran Palacon ktp. Niaj impresoj estis tiel grandaj kaj grandiozaj, ke ili ne estas priskribeblaj per vortoj. Ni promenis tra la impona urbo kaj dum tago kaj dum nokto.

La ĉefa celo de nia vojaĝo al Ĉinio estis viziti la urbon Ningbo, Zhejiang-provinco. Ningbo estas ĝemelurbo de Aachen ekde oktobro 1986. La 5-an de oktobro ni flugis al Ningbo, akompanate de mia tre bona E-amiko Shen Minglun* el Ningbo. En la flughaveno ni estis akceptitaj de s-ro Bao Shujun, prezidanto de la Ningbo-a Esperanto-Asocio. Atingante la hotelon "Nova Ĝardeno", ni havis grandan surprizon: Fotistoj, ĵurnalistoj kaj delegito de la magistrato de Ningbo jam atendis nin. En sia bonveniga paroladeto la magistrato

klarigis al ni, ke dum la sekvan-taj kvar tagoj ni estos honoraj gastoj de Ningbo. Li fiksas al niaj vestoj po unu relative grandan ruĝan insignon kun ĉinlingva surskribo "Honora Persono". Dum tiuj tagoj en Ningbo estis la Folkloraj kaj Komercaj Festivaloj. En ĉiuj aranĝoj ni havis honorajn sidlokojn kaj senkostajn partoprenojn. Por ni, simplaj civitanoj, tio estis grandega afero.

Kvankam la kulturoj de Eŭropo kaj Ĉinio estas en granda diferenco, niaj objektivaj impresoj estis absolute pozitivaj. La homoj estis tre afablaj, la gejunuloj tre modernaj. Mi provis legi el la vizaĝesprimoj de la homoj ilian kontentecon aŭ malkontentecon. Mi konkludis, ke la homoj, speciale la junaj ĝis ĉ. 50-60-jaraj, estis kontentaj, feliĉaj, gajemaj kaj malfermitaj. La gemaljunuloj ofte ŝajnis al mi ankoraŭ (iomete) konservativaj.

La amikeca solidareco laŭ miaj impresoj estas pli granda ol ĉe ni en Germanio. Ekzemple, ofte ni ĉiuj estis invititaj de tiu aŭ alia amiko de Minglun. Iu invitis nin al granda bankedo aŭ alia invitis nin al ŝipveturado al la belega insulo Putuo, inkluzive

manĝadon kaj loĝon en la templo kune kun la budhismaj monaĥoj. La monaĥoj montris al ni siajn internajn spacojn.

Ni restis ok tagojn en la belega urbo Ningbo. Poste venis E-amiko el Changzhou al Ningbo por akompani nin al sia urbo. Ni gastis en aliaj familioj. La manĝaĵo ĉiam kaj ĉie ege bongustis. Ni neniam havis malfacilaĵojn manĝi per bastonetoj, tamen ni antaŭe neniam havis la eblecon manĝi per bastonetoj. Ni restis tri tagojn en Changzhou. Fine Zhaoyin akompanis nin por du tagoj en Ŝanhajo. Dum nia reflugo al Düsseldorf, Germanio, ni vizitis Moskvon kaj loĝis du noktojn ĉe esperantistoj.

Sen nia amata Esperanto tiu belega vojaĝo estus nebla. ■

*S-ro Shen Minglun verkis la artikolon "Rakonto pri filatelaĵoj", kiu temas pri la sincera amikeco inter li kaj s-ro Wolfgang Bienen kaj aperis en nia revuo, n-ro 8, 1992. La rakonto estas kortuŝa en la historio de rilatoj inter la ĝemelaj urboj Ningbo kaj Aachen.

Ŝanĝiĝo de Yunxi-gubernio

de ZHENG ZHENJIE

ĈINIO havas pli ol dumil guberniojn. 592 el ili estas malriĉaj, ĉar ilia pokapa jara enspezo estas malpli ol 530 juanoj (ĉ. 8.3 juanoj egalas unu usonan dolaron). Yunxi (Junŝji)-gubernio de Hubei-provinco meze de Ĉinio havis tian vivnivelon eĉ antaŭ 1993. Ĝi, kun totala areo de 3 500 kvadrataj kilometroj, abundas je sterilaj montoj. Al ĝi mankas akvo kaj kulturebla tero. Dum multaj jaroj la kamparanoj sin okupis nur pri grenkultivado. Pro maloportuneco de trafiko kaj malrapideco de ekonomia disvolviĝo la kamparanoj, kiuj konsistigas 88% de la totala loĝantaro de la gubernio,



Kultivado de zingibro helpe de sciencistoj enspezis meznombro nur 453 juanojn jare.

Post 1993 Yunxi-gubernio reguligis sian agrikulturan strukturon laŭ sia situacio. Sur ŝtupar-kampoj la kamparanoj kultivis diversajn drogherbojn kaj industriajn plantojn. Precipe post kiam ili disvastigis en la tuta gubernio la kultivadon de zingibro, ili ricevis bonan ekonomian efikon kaj sin liberigis el malriĉeco.

Oni povas ekstrakti el zingibro saponinon kaj fari el prilaborita saponino 186 seriojn da medikamentoj de tri kategorioj: hormonoj kortika, seksa kaj gravediga. Kvankam ekzistas en la mondo kelkdek specoj de utiligeblaj vegetaĵoj entenantaj saponinon, tamen iliaj kvalito kaj enteno ne povas rivali kun tiuj de zingibro. Konstatinte, ke Yunxi estas taŭga por zingibro-kultivado, la lokanoj senhezite ekkulturis zingibron.

La kultivado de zingibro rapide disvolviĝis en Yunxi. Ĉiuj familioj sin okupas pri tiu laboro. Kaj la totala zingibro-kultura areo jam superis 5 300

hektarojn. Hetaoshuya-vilaĝo kultivis zingibron sur kampoj de 43 hektaroj kaj ĝia pokapa enspezo atingis mil juanojn en tiu jaro. Aperis en tiu vilaĝo en profunda montvalo ŝoseo, malgranda hidroelektrujo, etaĝdomoj, elementa lernejo, satelita televid-riceva stacio...

La kultivado de zingibro akcelis la disvolviĝon de farmaciaj kaj kemi-industriaj entreprenoj. Nun la Yunxi-a Ĝenerala Farmacia kaj Kemi-industria Fabriko jam produktis el zingibro saponinon, progesteronon, kortizonon kaj aliajn. Menciindas, ke saponino produktita de tiu fabriko estas eksportaĵo libera de dogan-kontrolo dum pluraj jaroj kaj vendiĝas en multaj landoj kaj regionoj.

Changchun-a ekonomia ekspluata distrikto

de JI PING

NUNTEMPE Ĉinio posedas 32 ŝtatnivelajn ekonomiajn ekspluatajn distriktojn. Por starigi tian distrikton, la loka registaro kolektas monon, rekvizicias teron, provizas la distrikton per aŭtovojoj, akvo kaj elektro kaj venigas en- kaj eksterlandajn entreprenojn kun potenca ekonomia forto kaj altaj teknikoj kaj sen polucio. Ĝenerale, la ekspluataj distriktoj allogas tiajn entreprenojn per politiko favora por imposto, tero-uzado k.a. Kaj la entreprenoj en la ekspluataj distriktoj funkcias laŭ nova sistemo, ne havante tiel multajn ŝarĝojn kiel malnovaj entreprenoj de la ŝtato. Dank' al tio, tiuj entreprenoj disvolviĝas rapide, kaj nemalmultaj ekspluataj distriktoj fariĝis novaj kvartaloj.

Kvar jarojn antaŭe, mi vizitis Changchun oriente de Yitong-rivero, kie verdis legom-kampoj kaj dise sidis malgrandaj fabrikoj, sed nun belas la Changchun-a Ekonomia Ekspluata Distrikto kiel nova kvartalo de tiu norda urbo, kie etendiĝas larĝaj kaj glataj aŭtovojoj, staras konstruaĵoj en blanka koloro kaj fabrikoj kun bela ĝardeno.

La ekspluata distrikto kaj la malnovaj kvartaloj ambaŭflanke de la rivero rigardas unu al la alia. Same kiel la malnovaj kvartaloj la nova estas provizita per akvo, elektro, gaso kaj aliaj kaj multe faciligis la konstruadon kaj transformadon de la malnovaj. Menciindas, ke oni praktikas akcian sistemon en la ekspluata distrikto, kiu obeas la merkatekonomian leĝon. Ankaŭ la unika administrejo de la distrikto diferencas de tiu de la registaro per alta labor-efiko. Ĝiaj dekelkaj departementoj kun pli ol



Produktolinio de la kompanio de aŭtocilindraj juntoŝtopaĵoj Elring

80 funkciuloj plenumas la laboron farendan por kelkcent personoj de kelkdek departementoj de ordinara registara administrejo.

Kvankam la Changchun-a Ekonomia Ekspluata Distrikto aperis malpli frue ol aliaj, tamen ĝi disvolvigis ne malpli rapide. Ĝis junio 1996 starigis en la distrikto 1 370 entreprenoj, el kiuj 166 estas kune investitaj de ĉinoj kaj alilandanoj, ekz., la Changchun-a Limigita Kompanio de Pepsi-Cola kune investita de Ĉinio kaj Usono, la Ĉina-Germana Changchun-a Limigita Kompanio de Juntoŝtopaĵoj Elring, la Changchun-a Limigita Kompanio de Motorcikloj kune investita de Ĉinio kaj Malajzio kaj la Changchun-a Limigita Kompanio de Medicinaj Produktoj Gahara. Ili ĉiuj, moderne administrataj, havas belan perspektivon.

Kurantaj aferoj

- En 1996 Ĉinio kulturis 112 milionojn da hektaroj da grenkampoj, kies totala produktokvanto superis 475 miliardojn da kg. Tio estas rekorda en la ĉina historio.

- Antaŭ la fino de la kuranta jarcento Ĉinio lanĉos por aliaj landoj pli ol 30 satelitojn per la raketo Changzheng.

Ĝis novembro 1996 Ĉinio jam lanĉis per la nomita raketo 48 satelitojn, el kiuj 17 estas destinitaj por scienca esplorado kaj teknika eksperimento, 10 por internacia komerco kaj 38 estas faritaj de Ĉinio mem.

- Nun en Ĉinio estas ŝoseoj de 1.15 milionoj da km (inkl. de 2 100-kilometraj ekspresaj aŭtoŝoseoj), per kiuj interkomunikiĝas ĉiuj gubernioj, 97% da urbetoj kaj 80% da vilaĝoj.

- La unua ĉina elektra personaŭto estis sukcese provita. La aŭto kun 5 sidlokoj funkcias per nikela-hidrogena akumulatoro. Unufoja ŝargo ebligas al la aŭto veturi maksimume 121 km., kun rapideco de 112 km. hore. Nun Ĉinio jam ellaboris planon por produkti tiajn aŭtojn.


- Ĉinio abundas je vento, ĉar 2/3 de ĝia areo estas ventoriĉaj. Laŭ plano, la kapacito de vent-energiaj generatoroj atingos milionon da kilovattoj en la jaro 2000.

Ĉinio jam popularigis 10 milionojn da malgrandaj domaj vent-energiaj generatoroj, kaj ĝia jara produktokvanto de tiaj generatoroj superis 30 000. Kaj en ĝi funkcias ankaŭ 15 vent-energiaj elektrejoj.

- Krom fiksa enspezo, la urbaj salajruloj de Ĉinio ricevas ĉiumonate ankaŭ nemalmulte da mono el publika bonstatiga fonduso. Statistiko montras, ke en 1995 la pokapa tia enspezo de la ĉinaj urbanoj atingis 3 304 juanojn, konsistigantajn 70% de ilia totala jara enspezo.

- Chengmai-gubernio de Hainan-provinco, Ĉinio, sukcese kultivis orkideojn de pli ol 500 famaj specoj el diversaj lokoj de la mondo kaj pli ol 100 sovaĝaj specoj de Hainan. Per tio la gubernio farigis la plej granda ĉina orkide-kultivejo en la tropika zono.

Vent-radoj por generatoroj en Xinjiang





S-ro Nagata Hideo

CHEN JINHUI:

ALILANDA FLORKULTURISTO EN ŜANHAJO

S-RO Nagata Hideo eksentis grandan ĝojon, kiam li informiĝis, ke la de li kulturitaj 200 000 potoj da belaj floroj rapide elvendigis kaj ke ili plibeligis la urbon kaj plezurigis ĝiajn loĝantojn.

La aspekto de s-ro Nagata Hideo estis tute ekster mia atendo: En paliĝanta vakera pantalone, kun larĝframaj okulvitroj kaj kot-plenaj ŝuoj, li neniom aspektis kiel riĉa sinjoro. Por mi estis tre malfacile asocii lin kun lia rango de direktiestro de kompanio.

Nia interparolo komenciĝis de lia fiksloĝiĝo en Ŝanhajo kaj lia ŝato al florkulturado. S-ro Nagata Hideo estis japano kaj transloĝiĝis en Usonon. Li diris al mi: "Antaŭ tri jaroj mi vojaĝis al Ĉinio kaj rimarkis, ke floroj malmulte vidiĝis en la hejmoj de ĉinoj. Mi okupiĝis pri florkulturado jam 30 jarojn. Mi intencis kulturi florojn en Ĉinio, dezirante, ke la floroj pli multe beligu la vivon de la ĉina popolo." Li daŭrigis: "Mi volas, ke oni ne nur aĉetu miajn florojn, sed ankaŭ lernu de mi la florkulturitan teknikon kaj ĝuu plezuron en la kulturado. Se via amiko vidos belajn florojn en via hejmo kaj demandas, kie vi aĉetis ilin, tiam ne nur vi, sed ankaŭ mi sentos grandan kontenton."

S-ro Nagata Hideo fiksloĝiĝis en Ŝanhajo, tamen li ankoraŭ ne alkutimiĝis al la ĉinaj manĝaĵoj kaj la ŝanhaja klimato. Li ja penas por la alkutimiĝo. Li kun ĝojo diris al mi, ke nun li povas paroli ĉine nur unu vorton "haochi" (bon-gusta). Tamen li malmulte konas Ĉinion. Nun laŭ

kontrakto li prizorgas 4 hektarojn da kampo en hortikulturejo antaŭurbe de Ŝanhajo. Li deziras duobligi sian florkampon en la venonta jaro. La 50-jara s-ro Nagata volas okupi sin pri florkulturado en Ĉinio en ĉiuj siaj ceteraj jaroj. Li elspezis jam 700 000 usonajn dolarojn por sia kariero kaj dungis 14 diplomitojn el superaj lernejoj kaj 20 kamparanojn por sia florkulturado. En lia forcejo mi vidis, ke li tre zorgeme flegas ĉiujn florojn. Fingre montrante la florpotojn, li diris al mi: "Oni devas tre atenteme flegi la florojn kaj ĉiutage observi ilin. Kiam ili malsaniĝis, tiam vi devas kuraci ilin ĝustatempe." Pro tio li tiel atenteme pririgardis la florojn.

Li sukcese disvendis siajn unuajn florojn. Post tio lia kompanio decidis oferti 350 000 potojn da floroj en la merkato por plibeligi la urbon en vitro. Kiel fakulo de ĝardenistiko, li diris, ke lia plej granda deziro estas kulturi aron da fakuloj pri ĝardenistiko en la venontaj 5 aŭ 10 jaroj kaj per tio kontribui al beligo de la vivo de la ĉina popolo.

En Los-Anĝeleso li havas grandan florgardenon kaj iujn aliajn entreprenojn. Nun lia unua filino, kiu diplomitiĝis el japana universitato, jam daŭrigis lian aferon. Liaj familianoj aprobas, ke li daŭrigos sian karieron en Ĉinio. Li diris: "Ĉiutage mi kune kun miaj laboristoj sarkas, mortigas fiinsektojn, transplantas kaj faras ĉion eblan por malkovri la leĝon de florkreskado en Ĉinio." Videblas, ke tiu alilanda florkulturisto vere volas prosperigi sian karieron en Ĉinio. ■

AKUPUNKTURO KAJ KUPRA HOMO

AKUPUNKTURO kaj mokso estas terapioj kreitaj de antikvaj ĉinoj. Kuracistoj per pingloj pikas akupunkturajn punktojn de malsanulo aŭ kaŭteras ilin por reguligi la visceran funkcion kaj forigi inflamon kaj doloron.

Antikvaj ĉinaj libroj notas, ke akupunkturo originis en la ŝton-epoko. Tiam, kiam oni suferis malsanon en iu korp parto, oni nature frapis kaj frotis tiun lokon per sia mano por mildigi la suferon. Poste ili trovis, ke la doloro malaperis aŭ mildiĝis, post kiam ili, vunditaj de ŝtono aŭ pikitaj de dornoj, prenis la kuracrimedon. Tial ili provis eksciti la malsanajn korp partojn per akra konusforma ŝtono. Tiaj antikvaj pingloj elteriĝis en Interna Mongolio kaj Henan-provinco de Ĉinio.

En la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.) Ĉinio kreis metalurgion kaj tiam kupraj kaj feraj pingloj anstataŭis la primitivajn ŝtonajn pinglojn. Medicina libro notas, ke tiam oni uzis 9 specojn da malsamformaj akupunkturiloj en kuracado.


Mokso estiĝis post kiam oni eksciis fari kaj apliki fajron. Antikvuloj trovis, ke la korp partoj fariĝis bone sentataj kaj la doloro mildiĝis, post kiam ili estis kaŭteritaj. Poste ili trovis, ke la brulanta artemizio estas taŭga por mokso, ĉar ĝi estas facile bruligebla kaj malfacile estingebla kaj plia fajro estas efika por vig-

ligi sangocirkuladon kaj forigi kongeston. Oni diras, ke ju pli maljuna estas la artemizio, des pli efika ĝi estas en la kuracado. Antikvaj libroj diras: "Por kuraci malsanon 7-jaran oni devas uzi artemizion 3-jaran."

Akupunkturo kaj mokso estas facile aplikeblaj en la kuracado de multaj malsanoj, tamen oni atingas kontentigan efikon nur tiam, kiam oni trovis ĝustajn *ĝinglŭo*-vojojn kaj akupunkturajn kaj kaŭterajn punktojn, alie la kuracefiko estas nekontentiga.

Jam antaŭ 2 500 jaroj oni trovis, ke en la homa korpo ekzistas *ĝinglŭo*-vojoj. La antikva medicina verko "Huangdi Neijing" havas klarajn priskribojn pri tio. *Ĝinglŭo* estas komuna nomo de *ĝing*- kaj *lŭo*-vojoj. Ili estas destinitaj por transporti vitalan energion al la homaj organoj. "Huangdi Neijing" opinias, ke en la homa korpo estas 12 *ĝing*-vojoj, kiuj kondukas al la 12 visceroj. *Ĝing*-vojoj entenas ankaŭ multajn branĉojn, t.e. *lŭo*-vojojn. Ili kune formis retan sistemon en la homa korpo kaj plenumas la taskon transporti vitalan energion al diversaj korp partoj de la homoj, dum la akupunkturaj kaj kaŭteraj punktoj troviĝas sur tiuj vojoj. Ĉiuj malsanoj senescepte okazas pro malglatiĝo de *ĝinglŭo*-vojoj, tial se oni trovas la konvenan *ĝinglŭo*-vojon kaj akupunkturas la koncernajn punktojn, do la vitala energio povas glate cirkuli kaj la malsano malaperas.

Tamen *ĝinglŭo*-vojoj ne estas videblaj nek palpeblaj. Ili ne apartenas al la sama kategorio de nervoj kaj sangvazoj en anatomio. Pro tio la instruado de akupunkturo kaj mokso havas mul-



Kupra homo

KIEL ĈINIO SOLVOS LA PROBLEMON DE GREN-PROVIZO?

Blanka libro, publikigita de la ĉina registaro oktobre de 1996, diras, ke en la venontaj dekoj da jaroj Ĉinio alfrontos la situacion de malgranda agraro, multnombra loĝantaro kaj granda bezono pri greno, tamen ĝi, kun latentaj fortoj de disvolvo, spertoj kaj rimedoj por solvi la grenan problemon kaj kun aktivaj kamparanoj povos solvi la problemon de gren-provizado per sia propra forto.

La blanka libro diras, ke post sia fondiĝo en 1949 la nova Ĉinio abolis la feŭdan agraran posedantecon, gvidis la popolon energie disvolvi la grenan produktadon kaj vivtenas 22% de la loĝantaro de la mondo per ĉ. 7% de ĝia agraro.

La blanka libro montras, ke en la venontaj jaroj la ĉinoj prenos manĝaĵojn mezkaloriajn, altproteinajn kaj malmultgrasajn. En 2030 kulminos la loĝantara nombro en Ĉinio. Tiam la pokapa gren-kvanto estos 400 kg, el kiuj pli ol 200 kg estos por ĉiutaga vivo kaj la ceteraj por brutoj, do tio povos levi la popolan vivnivelon kaj kontentigi la postulon de nutro-plibonigo.

Laŭ tiu disvolvanta tendenco de la konsumata modelo kaj la kreska skalo de la loĝantaro, en la venontaj dekoj da jaroj la grenkvanto postulata de Ĉinio estos: en 2000 Ĉinio havos 1.3 miliar-

dojn da loĝantoj, kiuj postulos 500 milionojn da tunoj da greno (ĉiu loĝanto ricevos averaĝe 385 kg); en 2010 la nombro de la loĝantaro proksimiĝos al 1.4 miliardoj, kiuj postulos 550 milionojn da tunoj da greno (ĉiu loĝanto ricevos mez-nombre 390 kg); kaj en 2030 estos 1.6 miliardoj da loĝantoj, kiuj postulos 640 milionojn da tunoj da greno (ĉiu loĝanto ricevos averaĝe 400 kg).

La blanka libro emfazas, ke sin apogi sur propraj riĉfontoj por efektiviĝi grenan memsufiĉecon estas fundamenta principo por Ĉinio solvi la problemon de sia gren-provizado. En normalaj cirkonstancoj la memprovizata procentaĵo de greno ne estos malpli alta ol 95% kaj la neta importa kvanto ne superos 5% de la enlanda konsumo.

La blanka libro en la fino diras, ke praktiko montros al la mondo: la ĉina popolo ne nur povos sin vivteni, sed ankaŭ levi sian vivnivelon jaro post jaro kaj faros kontribuon al gren-disvolvado de la mondo.

LA ĈINA LABORIGA STRUKTURO ŜANĜIĜIS

En la lastaj jaroj la ĉina laboriga strukturo multe ŝanĝiĝis, kio montriĝis jene:

Pasintecce la kamparaj laborfortoj fluis al urboj, sed nun la kamparaj kaj urbaj "interfluas", pli da urbaj laborfortoj venis en la kamparon. Laŭ statistiko, la urbaj laborfortoj konsistigas ĉ.

tajn malfacilojn. Por solvi tiun problemon, antaŭ 1 500 jaroj ĉinaj kuracistoj desegnis homan figuron kun 12 koloraj *ginglŭo*-vojoj sur ĝi, tio iagrade faciligis la memoron de la lernantoj, tamen tia desegnaĵo ankoraŭ havis limigitecon en la instruado. Por ke la instruado fariĝu pli facila, en 1027 kuracisto Wang Weiyi faris kupran homon por akupunkturo kaj mokso. Tio eble estas la plej frua instrua medicina modelo ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo.

La kupra homo estas akupunktura modelo versimila kaj delikata en grandeco de ordinara homo. Interne de ĝia korpo estas diversaj visceraj modeloj, dum la aliaj lokoj estas vakaj. Sur ĝia surfaco estas montritaj *ginglŭo*-

vojoj. Ĉiuj akupunkturaj kaj kaŭteraj punktoj estas montritaj per truetoj kun sia nomo. Ĝi estas tre utila por la lernantoj. En ekzameno instruisto tegis la korpon per vakso, plenigis la modelon per akvo aŭ hidrargo kaj fine vestis ĝin. Poste la lernantoj provfaris akupunkturon. Se ili trovis la ĝustajn akupunkturajn punktojn, do la pingloj eniĝis en la truetojn kaj el ili elfluis likvaĵo. Se la lernantoj ne trovis la ĝustajn akupunkturajn punktojn, do la pingloj ne povis eniruigi kaj pikis nur la vakson. Tia ekzameno estis kaj facila kaj utila. La instruado kun la kupra homo multe helpis la instruiston.

La kupra homo eble ne estas tre miriga en la okuloj de la nunaj homoj, tamen antaŭ 1 000 ja-

roj ĝi estis valorega, ĉar ĝi estis farita surbaze de la teorio pri *ginglŭo*-vojoj kaj ĉiuj ĝiaj akupunkturaj kaj kaŭteraj punktoj estas precizaj. En la lastaj jaroj ĉinaj medicinistoj kreis novan metodon por trovi *ginglŭo*-vojojn kaj trovis, ke la akupunkturaj kaj kaŭteraj punktoj sur la kupra homo estas tute samaj, kiel tiuj trovitaj per modernaj sciencaj aparatoj. Modernaj ĉinmedicinaj kuracistoj ĝuste trovas la malsanigajn *ginglŭo*-vojojn per sciencaj metodoj kaj faras akupunkturon sur tiu vojo unu mm larĝa kaj efike kuracas multajn malfacile kuraceblajn malsanojn. Ekz. eminentaj akupunkturistoj povas efike kuraci la malsanulojn, kiuj suferas de strabismo kaj lipa oblikviĝo, nur en 10 tagoj. ■

10% de la 130 milionoj da profesiuloj en la kamparaj entreprenoj.

La nombro de profesiuloj en la privataj entreprenoj rapide kreskas. Fine de 1995 la nombro de tiaspecaj profesiuloj atingis 50.6 milionojn, je 6.36 milionoj pli multe ol en 1994;

La procentaĵo de la urbaj oficistoj kaj laboristoj, escepte de tiuj de la ŝtataj kaj kolektivaj entreprenoj, kontinue leviĝas. En la fino de 1995 la nombro de la ŝtataj oficistoj kaj laboristoj reduktiĝis je 600 000 kompare kun 1994;

La nombro de ŝtatoficistoj reduktiĝis, tamen tiu de laboristoj kaj oficistoj en la ŝtataj administrejoj kreskis. Sed tiu en la ŝtataj organoj malkreskis je 210 000 kompare kun 1994.

NOVA MALKOVRO DE DINOSAŬRAJ OVO-FOSILIOJ

Lastatempe ĉinaj arkeologoj unuafoje trovis pli ol 30 kompletajn dinosaŭrajn ovo-fosiliojn en montregiono de Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco, pli ol 100 km for de Xixia (Ŝjiŝja) de Henan-provinco, kie oni multfoje trovis dinosaŭrajn ovo-fosiliojn. La nove eltrovitaj fosilioj dislokiĝis ĉefe en griza grejso ĉ. 3 m dika. La periodo de amasiĝo de grejso antaŭ 100-70 milionoj da jaroj estis prospera periodo de dinosaŭroj. Observinte la grandecon, formon kaj vejnojn de la eltrovitaj dinosaŭraj ovo-fosilioj, la arkeologoj opiniis, ke ili estas tiel raraj, kiel tiuj trovitaj nur en Francio. El la ovo-fosilioj la plej granda longas ĉ. 153 mm kaj larĝas ĉ. 130 mm.

KAMPARANA FAMILIO AMANTA PEN-TRADON

Chen Fulin, 52-jara kamparano loĝanta antaŭurbe de Ŝanhajo, komencis pentri antaŭ 30 jaroj, allogate de la kabanjoj en originala aspekto, antikva kaj simpla blue tinkturita katuno kaj krudaj fornoj de sia hejmloko. Ĝis nun li jam faris 120 pentraĵojn, el kiuj 7 estis premiitaj de la ŝtato. Influate de li, ankaŭ lia edzino eklernis pentradon. Post kelkjara lernado ŝi jam pentris bildojn elspirantajn morojn kaj kutimojn sude de Yangzi-rivero. Ŝi pentris "Ruĝaj persikfloroj" kaj donacis ĝin al la 4-a Monda Virina Konferenco. Influate de ili, ankaŭ iliaj du filinoj lernas pentri kun granda entuziasmo, kaj iliaj 41 pentraĵoj eksponiĝis kaj konserviĝis en Japanio kaj iuj okcident-eŭropaj landoj.

ĈINAJ PIEDPILKAJ FANATIKULOJ

En Ĉinio ne estas mondnivela piedpilka tea-

mo, tamen ĉinaj piedpilkaĵaj fanatikuloj estas mondnivelaj. Precipe en la lastaj jaroj la ĉina piedpilkaĵo suriris profesian vojon kaj la ĉiam oftaj piedpilkaĵaj konkursoj ekscitis la fanatikulojn. Nun estas ordinara afero por ili flugi al alia urbo aŭ lando por rigardi piedpilkaĵadon.

La piedpilkaĵaj fanatikuloj deziras, ke la de ili amata piedpilkaĵa teamo gajnu, kaj ke la ĉina piedpilkaĵa teamo estu forta. En Liaoning-provinco, kie piedpilkaĵo bone disvolviĝis, vivas piedpilkaĵa fanatikulo Luo Xi (Lŭo Ŝji). Li iam ĵuris, ke li ne edziĝos, antaŭ ol la ĉina teamo gajnos en Azio. Kiel atendite, li edziĝis, post kiam la ĉina piedpilkaĵa teamo venkis en azia konkurso.

Oni diras, ke la ĉinaj piedpilkaĵaj fanatikuloj estas amindaj. Ili estas frenezaj, tamen malofte levis tumulton. Kvankam la ĉina piedpilkaĵa teamo plurfoje korŝiris ilin en internaciaj konkursoj, tamen ilia sinteno ĉiam estas "ni amas vin, ĉu vi venkos aŭ malvenkos". Ili kredas, ke venos la tago, kiam oni alte taksos la ĉinan piedpilkaĵan teamon.

UZO DE MANĜBASTONETOJ

Preĝi manĝaĵon per paro da bastonetoj estas kutimo de la ĉinoj. Manĝbastonetoj, ĉ. 26 cm longaj, estas faritaj ĝenerale el bambuo.

Estas nemalmultaj moroj en uzo de manĝbastonetoj. En iuj lokoj de Ĉinio oni metas paron da manĝbastonetoj en la doton de novedzino, kun la deziro, ke ŝi tiu pli frue nasku filon. Ankaŭ estas tabuoj en uzo de manĝbastonetoj. Ekz. estas tabuo frapi malplenan bovlon per manĝbastonetoj, ĉar nur almozoj frapas malplenan bovlon por almozpetado. Estas tabuo starigi manĝbastonetojn sur rizo en bovlo, ĉar tio signifas memori pri mortinto en funebra ceremonio. En festeno estas tabuo meti paron da manĝbastonetoj ambaŭflanke de bovlo, ĉar tio signifas disiĝon. En plejparto de la ĉinaj regionoj, manĝinte oni devas meti la manĝbastonetojn sur bovlon por montri satiĝon, tamen sur ŝipo, en iuj marbordaj regionoj, tio signifas malfavoran aŭspicion de grundado de ŝipo. Se la manĝbastonetoj falas teren dum manĝado, tio signifas malbenon. Tiam oni devas preni alian paron da manĝbastonetoj kaj portempe ne preni la falintajn. Estas malpermesate uzi paron da manĝbastonetoj, malsamkoloraj aŭ malsamlongaj; estas malpermesate per manĝbastonetoj traserĉi la manĝaĵon aŭ teni la manĝbastonetojn per buŝo.



Oroĉen-oj adiaŭis ĉas-pafilojn

de YI ZHOU

*Sur montaro alta,
en arbaro vasta,
vivas oroĉen-oj bravaj,
kun pafiloj, sur ĉevaloj,
ĉasas cervojn, kapreolojn...*

Tiu kanto estis bone konata de ĉinoj antaŭ 30 jaroj. Pro tio famiĝis ankaŭ oroĉen-oj, kiuj de multaj generacioj vivtenis sin per ĉasado en arbaro de la Granda Xing'an(Sing'an)-montaro de nordorienta Ĉinio. Eĉ nun, kiam maljunaj oroĉen-oj kantas ĝin, ili sentas fieron kaj emocion.

Tamen nun la "pafilo" kaj "ĉevalo" por ĉasado jam iĝis historiaj. De 1988 oroĉen-oj ne nur ĉasis, sed ankaŭ entreprenis aliajn laborojn. En 1996 ili ĉesigis sian tradician ĉasadon, kaj okazis historia ŝanĝigo en iliaj vivkaj labor-manieroj.

ANTIKA TRIBO DE ĈASO

Oroĉen-oj loĝis norde de Heilongjiang(Hejlongĝjang)-rivero, poste ili transloĝiĝis al la Granda Xing'an-montaro. La vorto "oroĉen" signifas "montanon" kaj "uzanton de boaco", ambaŭ montras ilian vivon. Ĝis la 50-aj jaroj oroĉen-oj ankoraŭ loĝis en la montaro kaj restis la lasta tribo de ĉaso en Ĉinio.

Antaŭe ili uzis diversajn ĉasilojn, kiaj ŝtono, ligna bastono, lanco kaj tranĉilo el ostoj, kaj

poste uzis pafarkon ĝis la mezo de la 18-a jarcento. Pafiloj estis uzataj nur en la nuna epoko, kune kun skioj, kanuoj, boacoj, ĉevaloj kaj hundoj.

Oroĉen-aj knaboj en sia 7-a aŭ 8-a jaro komencis lerni ĉasadon kaj fiŝadon de la patro kaj pli aĝa frato. 15-jaraj, ili jam kapablis fari ĉasadon unuope. Abundas legendoj pri junaj

herooj, kiuj mem kaptis tigron aŭ urson.

En ĉasado formiĝis la karakteroj de oroĉen-oj — kuraĝo, persisto, helpemo, honesto kaj malkaŝemo. Reveninte de ĉasado, ili dividis la ĉasajon ĝenerale egale, sed tiuj, kiuj estis malpli riĉaj kaj malpli fortaj, ricevis pli multe ol aliaj. Kiam oroĉen-oj interŝanĝis objektojn kun alinacianoj, ili



En familio de oroĉen-oj

Ĉiam estis malavaraj kaj neniam marĉandis.

Preskaŭ ĉiuj oroĉen-oj estis lertaj ĉasistoj. Ili havis malbonan loĝejon kaj ofte dormis kaj manĝis en arbaro por ĉasi bestojn. Ili neniam timis suferon kaj malfacilaĵon, kaj pro multjaraj ĉasado kaj vivado en izolita arbaro ili ne havis tempon viziti lernejon kaj malofte kontaktis homojn eksterajn, tial ilia socio evoluis malrapide. Aliflanke, la moderna mondo rapide progresis, oni okupis pli kaj pli da terenoj, kaj la oroĉen-aj ĉasistoj ne plu havis taŭgan ĉasejon kaj vivis en mizero. En 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, estis nur 2 000 oroĉen-oj, kiuj alfrontis diversajn problemojn.

EN MODERNA SOCIO

De 1953 ĝis 1957, por plibonigi la vivkondiĉojn de oroĉen-oj, la ĉina registaro konstruis ekster la montaro 16 loĝlokojn fiksitajn, helpis oroĉen-ojn transloĝigi el la arbaro kaj havigis al ili novan kaj stabilan vivon. De tiam ili sin okupas ne nur pri ĉasado, sed ankaŭ pri terkulturado, brutobredado kaj komercedo. En la loĝlokoj estas vendejo, grenejo, poŝtoŝeĉejo kaj lernejoj. Infanoj povas lerni en elementkaj mezlernejoj. Taĉmentoj de kuracistoj tien senditaj de la registaro ofte disvastigis higienajn sciojn kaj donis kuracadon. La epidemioj, kiel variolo, morbillo kaj tifo, kiuj longe suferigis oroĉen-ojn, estis detenitaj. Poste aperis hospitaloj kaj sanitarejoj, kiuj senpage servis al la oroĉen-oj. Pliboniĝis la vivkondiĉoj kaj la nombro de la loĝantaro kreskis al 6 965 en la jaro 1990.

Tamen estas malfacile ŝanĝi la tradicion. La oroĉen-oj, kiuj kutimis ĉasi, ne povis forgesi la arbaron. Iuj maljunuloj ne bone

dormis kaj manĝis en nova loĝloko. Multaj ne havis sperton pri terkulturado, nur simple semis kaj neniam prilaboris la kampojn. Ĉevaloj, bovoj kaj aliaj hejmaj bestoj ofte mortis pro mallerta bredado. Iuj homoj fine forlasis la kampojn kaj revenis al la arbaro.

ADIAŬO AL ĈASPFILO

La socio ĉiam pli moderniĝas kaj estas neevitebla la influo de la moderna vivo al la oroĉen-oj. La rapida progreso de ekonomio kaj formiĝo de merkata sistemo igis la oroĉen-ojn forlasi la ĉasadon. Ili pensis, ke oni ne povas riĉiĝi nur per ĉaspafilo. Ili ankaŭ rimarkis la gravecon de medio-protektado, ĉar pli kaj pli malmultiĝas la bestoj. Multaj lertaj ĉasistoj adiaŭis siajn ŝatajn pafilojn kaj komencis novan vivon.

Vilaĝano He Paishan en sia 6-a jaro jam komencis akompani la patron en ĉasado en alta montaro kaj primitiva arbaro. Post kelkdekjara ĉasado li eklernis konduki traktoron en 1986 helpe de la registaro. En kelkaj jaroj li ekspluatis pli ol 200 hektarojn da virga tero, aĉetis kompletan da agrikulturaj maŝinoj kaj famiĝis kiel posedanto de farmejo. En la pasintaj 10 jaroj li vendis milionon da kilogramoj da greno kaj enspezis ĉiujare 60 aŭ 70 milojn da juanoj.

La 39-jara Bai Sezhu (Baj Seĝu) estis lerta ĉasisto kaj nun

estas amanto de agrikultura tekniko. En la pasintaj du jaroj li aplikis siajn sciojn al kulturado de orelfungoj kaj enspezis 20 mil juanojn jare. Liaj iamaj ĉaskamaradoj laŭdis lin "lerta en kulturado de orelfungoj pli ol en ĉasado".


Nun la ĉasistoj rigardas la agrikulturan teknikon kiel plej taŭgan teknikon. Multaj novaj teknikoj estas vaste aplikataj en la vilaĝoj de oroĉen-oj, kiuj,



Cervoj paŝtataj

krom konstrui forcejojn, ankaŭ kovris kampojn per plasta membrano. En 1995 la Oroĉen-a Aŭtonoma Gubernio kulturis nigrajn orelfungojn kun produktovaloro de 10 milionoj da juanoj. Filiko, prilaborite de oroĉen-oj, tre plaĉas al japanoj kaj bone vendiĝas en la merkato de Japanio.

Estas tute nature, ke la oroĉen-oj, forlasinte la ĉaspafilon, eliris el la arbaro. La tuta nacio kunvenis kaj deklaris al la mondo: oroĉen-oj volonte ĉesigis sian ĉasadon kaj neniam mortigos sovaĝajn bestojn. ■



LA OKA MIRAKLO DE LA MONDO

— CD pri la Terakota Legio de Qin-dinastio

Ying Zheng (246 a.K. - 209 a.K. sur trono) estis la unua feŭda imperiestro en la ĉina historio. Li unuigis Ĉinion kaj fondis la unuan ĉinan feŭdan centralizitan dinastion. El lia maŭzoleo oni elterigis pli ol 6 000 versimilajn terakotajn soldatojn kaj ĉevalojn. Tio estas rigardata kiel la oka miraklo de la mondo. Por reaperigi tiun miraklon, la disko konigas la vivon kaj meritojn de imperiestro Ying Zheng kaj montras la aspekton de la terakotaj soldatoj kaj ĉevaloj kaj aliajn historiajn objektojn. Ĝi prezentas 1 200 bildojn kun angla-lingva traduko kaj eleganta ĉina nacia muziko.

La enhavo de la disko

- Vivo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio
- Muzeo de la Terakota Legio de Qin-dinastio
- Arto de la legio
- Bronzaj ĉaro kaj ĉevaloj
- Studo pri la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio
- Prifosado de la terakota legio
- Metiarto de la terakotaj soldatoj kaj ĉevaloj

Por uzi la diskon estas bezonataj Hardvaroj

- IBM PC aŭ IBM-kongruaj (80486 SX-25 aŭ pli)
- 4MB RAM aŭ pli; 8 MB RAM rekomendinda
- MPC-kongrua son-karto de 8 pecoj. Son-karto de 16 pecoj rekomendinda
- CD ROM (rapideco: pli ol 150 KB/sek.)
- Super VGA grafiko taŭga por kolora monitoro (256 koloroj aŭ pli)
- Muso

Softvaroj

- Microsoft MS-DOS 5.0 aŭ pli
- Microsoft Windows 3.1 aŭ pli
- MSCDEX 2.2 aŭ pli

Eldonita de Lishan Microelectronics Xi'an Grand-Fortress Corporation

Mendu ĉe: s-ro Wang Ruixiang, redakcio de "El Popola Ĉinio"

Prezo: 38 usonaj dolaroj (inkl. de sendokosto)
Adreso: Baiwanzhuang-lu, n-ro 24, P.O.Kesto 77, Beijing, 100037 Ĉinio

Tel. kaj telefakso: +86-10-68321808

Ĉe la Akvorando

“Ĉe la Akvorando” estas unu el la kvar famaj klasikaj romanoj de Ĉinio. Ĝi estis verkita de s-ro Shi Nai'an de Ming-dinastio, kiel la unua ĉina romano pri kamparana ribelo. Pere de priskribo de la naskiĝo, disvolviĝo kaj malvenko de la kamparana ribelo estrata de Song Jiang (Song Ĝjang), la romano montras la kortuŝajn batalojn de la kamparana revolucio en la feŭda ĉina socio. Pro siaj zigzagaj intrigoj, esprimriĉaj vortoj, viglaj herooj kun distingiĝaj karakteroj ĝi ricevis altan artan takson. Ĝi estas vaste legata en la ĉina socio.

La poŝtmarka serio konsistas el 9 pecoj. Ĝi, desegnita laŭ la ĉefaj intrigoj de la romano, estis emisiita en 1991 de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko.



水
滸
传

中国古典文学名著



Paraŝutado
de Sławomir Szymala (Pollando)



Vintra pejzaĝo
de Sławomir Szymala (Pollando)



ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第二期

(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2